1985 aprilo
78a jaro
n-ro 952 (4)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Rigarde al la planoj
por la Centjara Jubileo
de la Internacia Lingvo

Vi trovos

ĉi-rubrike konstaton kun kritiko kaj laŭdon kun propono. La redaktoro konstatas, ke kiam li petas de iuj sukcesaj movadaj aktivuloj informojn pri ilia agado, ili emas respondi, ke tio malfacile eblas, ĉar ili dediĉas sian tempon al ekstera informado pri Esperanto. Ĉu ili ne iom eraras? Interna informado estas ne nur kondiĉo, por ke utila agado daŭru per la transdonitaj spertoj, sed ankaŭ por ke okazu la ĉie necesa kontinua ampleksigo de tiu ekstera informado. Tamen, konstati, ke multaj parolantoj de Esperanto ne kapablas vastigi sian internaciemon al internacieco, verŝajne estas pli kritiko al la nuna mondo ol al tiuj esperantistoj. Laŭdinda kaj ĝojiga estas la apero de ruslingva lernolibro (vd. paĝon 77), kiel ankaŭ de la informilo *Kio estas USSR?* (vd. paĝon 74). Kial ne montri tiun informilon, kune kun la broŝuroj *La Federacia Respubliko Germanio, Norvegujo* kaj aliaj malpli novaj, al sia nacia informejo kaj peti, ke la propra lando faru simile?

Enhavo

61 Centjara Jubileo: Unua skizo de la jubileaj planoj
65 Forpasis d-ro Sinoda (1902-1985)
66 Reagoj: Absurda demando! (P.H. van Terwisga); Prijuĝi la lernilojn (Zsuzsa Barcsay)
67 Faka agado: Interkibernetik' 85
Parlamenta agado: Sukcesa akcepto
Landa agado: Pozitiva eksiĝo
68 Esperanto en radio: Kion signifas "Universala Tempo" (Georges Larglantier)
69 Intervjuo: Larĝe stimuli la sciencan diskutadon
70 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 70a Universala Kongreso)
71 Recenzoj: *Saluton al la suno* de Edwin de Kock (M. Nervi); *Istorija i sovremennoe sostojanie interlingvistiki; Interlinguistica Tartuensis 3* red. de Paul Ariste (K. Schubert); *La monto* de István Nemere (G. Berveling)
73 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
75 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
78 Oficiala informilo de la CO de UEA
80 Anoncetoj; Nekrologoj

La kovrilo

montras knabon, kiu esploras sian terglobon. Iusence ankaŭ ni esperantistoj sukcesas redukti la Teron al trakteblaj proporcioj, ĉar kiel ĝiaj multaj homoj kun diversaj kulturoj kaj vivkonceptoj dece intertraktu sen uzi sendiskriminacian interlingvon. La Centjara Jubileo de la Internacia Lingvo estos oportuna momento pro festi kaj pli vaste informi, sed la terglobo povas simboli ankaŭ la necesan komprenon pri la veraj proporcioj: la Jubileo estos nur unu plia grava paŝo survoje al konsciigo de la mondo pri la ebleco juste solvi la lingvoproblemon. (Foto: Unesko/N. Durrell McKenna.)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.
Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**
Voĉlegata por blinduloj.
Redaktoro: Geoffrey Sutton.
Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.
Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.
Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).
Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).
Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 952 (4), april 1985. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Unua skizo de la jubileaj planoj

Jam de 1981 UEA laboras por inde festi la Centjaran Jubileon de la Internacia Lingvo en 1987. En 1982 UEA starigis apartan **administrejon por la Jubilea Jaro**, kiun prizorgas André Staes, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio. Tel. (03) 234 34 00. Samjare aperis la grava libreto *Kiu faru kion; gvidilo por plenumo de la programo pri la Centjara Jubileo de Esperanto*, de A. Brennan kaj R. Corsetti. Pri la jubileaj simbolo kaj afiŝo ĉiu devus jam scii. Unuflanke UEA ellaboris internacian programon kaj aliflanke nacie kaj specialkampe agas la landaj kaj fakaj asocioj de UEA. Ĉion ĉi provas kunplekti la Internacia Kunordiga Komitato por la Jubilea Jaro.

Jen la unua ampleksa skizo pri la planita kaj efektivigata agadoj. Kiel vi konstatos, mankas al ni ankoraŭ multaj aktualaj informoj, kio supozeble estas neevitebla en tiel vasta programo, plenumata en tiel multe da landoj. Aliflanke, neniel eblus mencii ĉiun eron, kaj konsciante, ke belaj planoj ne ĉiam fariĝas realo, ni provis mencii nur planojn, kiuj ŝajnas efektivigeblaj. La prezento espereble funkcios ankaŭ kiel katalizilo, stimulante pli da agado per pli da reciproka informado. La utilo de informado inter movadaj centroj estas instrui aliajn kaj mem lerni de jamaj spertoj. Taŭga devizo por la nuna stadio de la agado povus esti „Komparu kaj kunlaboru"! La redaktoro volonte ricevas bone verkitan, stimulan materialon (laŭeble kun fotoj) pri jam plenumita jubilea laboro kaj ties kielo.

Internacia Patrona Komitato

Internacian Patronan Komitaton la Esperanto-movado lastfoje starigis okaze de la centjara jubileo de la naskiĝo de d-ro Zamenhof en 1959. Por glate starigi kaj kunordigi la ŝlosile gravan Internacian Patronan Komitaton por la Centjara Jubileo de Esperanto, UEA baldaŭ dissendos gvidliniojn por la agado, kaj petas, ke oni ne ekagu, antaŭ ol legi tiujn informojn. Oni nun verkas apartan jubilean broŝuron, minimume en la angla kaj franca, por prezenti al la kandidatoj por la Internacia Patrona Komitato. Ĝi skizos gravajn jubileajn programerojn de la asocioj, kiuj estas anoj de la Internacia Kunordiga Komitato por la Jubilea Jaro. Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, verkas enkondukan invitleteron.

Patronaj komitatoj

La jubileaj komisionoj de sep landaj asocioj (en Aŭstralio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Hispanio, Malto, Pollando kaj Svislando, (prizorgata de Kultura Centro Esperantista) jam formis landan patronan komitaton, dum tiaj estas planataj en Danlando, Islando, Italio, Jugoslavio, Kanado kaj Nov-Zelando. Ankaŭ en Kamerunio oni montris intereson. Ĉiu landa asocio de UEA estas petata formi nacian patronan komitaton.

Universala Esperanto-Asocio

Inter la aparta agado de UEA mem estas la eldonserio Jubilea Kolekto "Jarcento de Esperanto", kies unua volumo, *Esperanta antologio; Poemoj 1887-1981* jam aperis. Aparte akcentinda verko por la Jubileo estas la verkata *Nova enciklopedio de Esperanto*. Krome aperos ĉe UEA du bazaj informlibroj: *La fenomeno Esperanto* de William Auld kaj *Esperanto: lingvo – literaturo – movado* de Pierre Janton. UEA publikigos ambaŭ librojn ĉefe por ke oni traduku ilin nacilingven, pri kio jam interesiĝas aktivuloj en Ĉinio, Norvegio kaj Japanio. Komenciĝis planoj pri la ellaboro de portebla ekspozicio, kiu estos aĉetebla ĉe UEA. Pluraj landaj asocioj eklaboris por peti siajn aŭtoritatojn eldoni **poŝtmarkon** okaze de la Jubileo. Por helpi en tio espereble povos aperi en Ĉinio kolora katalogo de ekzistantaj poŝtmarkoj kun Esperantaj temoj. UEA jam petis la kunlaboron de Universala Poŝta Unio. Krom tio, UEA entreprenas la taskon – pere de kelkaj registaroj – peti **Uneskon** meti la Centjaran Jubileon de Esperanto en sian kalendaron de venontaj eventoj de tutmonda signifo, same kiel okazis por la Centjara Jubileo de la Naskiĝo de Zamenhof en 1959. Inter aliaj menciindaj agadoj estas la propono okazigi apartan konferencon de Centro de Esploro kaj Dokumentado (CED). Por helpi financi la jubilean agadon de UEA troviĝas la fonduso Jubilea Jaro.

Planoj de landaj asocioj

Jam ekzistas nacia komisiono por la Jubilea Jaro de la landaj asocioj en Belgio, Brazilo, Bulgario, Danlando, Hispanio, Islando, Malto, Nov-Zelando, Norvegio, Pollando kaj Svislando. Komisionoj estas preparataj en Finnlando, Hungario, Japanio kaj Venezuelo. Funkcias ankaŭ Balkana Komitato kun kunlaboro el Bulgario, Greklando, Jugoslavio, Rumanio kaj Turkio.

Rilate **gazetarajn servojn**, Germain Pirlot (Kemmelbergstraat 5/B.3, B-4800 Oostende, Belgio) ellaboris konsilaron, kiu povus interesi landajn asociojn. Nepras, ke ĉiu lando kun landa asocio de UEA havu

funkciantan gazetaran servon por 1987 kaj laŭeble ankaŭ poste.

Diversaj landaj asocioj celas utiligi la Manilan Deklaracion, favoran al **Esperanto en la turismo**, por stimuli la praktikan uzadon de la lingvo. UEA eldonos apartan Esperanto-dokumenton por tiu agado.

Kelkaj landaj asocioj kaj eldonejoj jam iniciatis jubileajn eldonseriojn.

Por financi la agadon pluraj landaj asocioj starigis jubilean fonduson, por ricevi donacojn.

Argentino: Argentina Esperanto-Ligo (AEL) proponis okazigi tradician amuzfestivalon en 1986, lige al internacia renkontiĝo kun plejparte sudamerikaj esperantistoj. AEL volas aranĝi ankaŭ t.n. rondtablan konferencon pri la Internacia Lingvo kaj komunikado kaj simpozion pri la historio de Esperanto. AEL deziras organizi ekspozicion, literaturan konkurson kaj planas apartan gazetaran agadon por 1987.

Aŭstralio: Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) eldonos antologion kaj historion pri la enlanda movado.

Balkano: Balkana Komitato proponas aranĝi regionajn simpoziojn pri scienco, historio kaj instrumetodoj kaj Balkanan Teatran kaj Pupteatran Festivalon. Ĝi entreprenas paŝojn por eldoni jubilean afiŝon kaj planas apartan gazetaran agadon por 1987.

Belgio: Belga Esperanto-Federacio (BEF) havigos katalogojn de Esperanto-kursoj kaj libroj en bibliotekoj. Konstanta gazetara servo estas grava parto de la belga agado. BEF starigos ekzamenkomisionon. Flandra Esperanto-Ligo (FEL) daŭrigos siajn konatajn kadrokursojn, en kiuj oni lernas pri movadaj taskoj. Ĝi planas eldoni historion de la flandra movado kaj biografion de Zamenhof en la nederlanda.

Brazilo: Nacia Esperanto-Komisiono eldonos libron pri Zamenhof en la portugala. Spirita Eldona Societo F.V. Lorenz baldaŭ eldonos antologion de brazila poezio kiel parton de sia jubilea programo.

Britio: Londona Esperanto-Klubo preparas tradukeblan materialon por utiligo en lernejaj klasĉambroj. Ĝi per praktikaj taskoj atentigos pri la problemoj de internacia komunikado kaj instigos la uzantojn mem pripensi la argumentojn kaj eltrovi la solvon. Esperanto-Asocio de Britujo vendas diversajn komercajn varojn kun simboloj kaj surskriboj pri la Jubileo, sed mankas informoj pri jubilea programo.

Bulgario: Bulgara Esperantista Asocio (BEA) planas okazigi jubilean festivalon kaj solenan sciencan sesion en Sofio en 1987, ĉi tiun sub aŭspicio de Bulgara Akademio de Sciencoj. BEA krome preparas materialon pri la Jubileo por lernejoj, en kiuj oni lernas Esperanton. Ekspozicion oni planas en la Nacia Biblioteko, okaze de la centjara jubileo de la apero de la unua libro en Esperanto. Oni krome deziras produkti enlandan porteblan ekspozicion. Organiziĝos aparta gazetara agado por 1987. La entrepreno Interfilm pretas financi kaj produkti 30- ĝis 40-minutan



dokumentan kolorfilmon 16mm-an pri Esperanto, de kiu kopioj estos aĉeteblaj. BEA planas eldoni krestomation, antologion de nuntempa bulgara poezio kaj historion de la landa Esperanto-movado. Plia eldonplano de BEA estas aperigi libron kun la opinioj de sciencistoj kaj verkistoj pri Esperanto. BEA malfermos Esperantan bibliografian centron.

Ĉeĥoslovakio: Ĉeĥa Esperanto-Asocio (ĈEA) planas okazigi Esperantistan Kulturan Festivalon en Opava en 1987. ĈEA organizos tutŝtatan ekspozicion "Cent jaroj de batalo por mondpaco kaj interkompreniĝo", eventuale kompilitan helpe de reklamagentejo, fakliteraturan ekspozicion "Esperanto: komunika lingvo de scienco kaj tekniko" kaj beletran ekspozicion. ĈEA eldonos informlibron de d-ro J. Jermař kaj konsilaron por lokaj grupoj. Okazos konkurso pri la plej bona informado pri Esperanto dum la Jubilea Jaro, literatura konkurso pri tradukoj el la ĉeĥa en Esperanton. ĈEA cetere serĉas bonajn scenarojn por televidaj prezentoj. Aliaj planoj estas por medalo kun teksto "1987 – Centjara Jubileo de Esperanto", afiŝo pri la Jubileo, antologio, traduko en la ĉeĥan de elektitaj pecoj el *Esperanta antologio*. ĈEA klopodas malfermi Esperantan turisman centron. Tiuj, kiuj donacis por la jubilea programo de ĈEA, ricevas apartan donacdiplomon. Okazos aparta gazetara informado dum 1987.

Danlando: Dana Esperanto-Asocio (DEA) aparte informos parlamentanojn pri Internacia Parlamenta Esperanto-Grupo kaj formas parlamentan premgrupon kiel tiu en Britio. DEA jam produktis apartan informilon pri la Jubileo. Oni preparas informlibron pri Esperanto lige kun metodoj de lingvo-instruado.

Francio: Unuiĝo Franca por Esperanto eldonos antologion de Esperanta literaturo en la franca. Pliaj informoj mankas.

Germana DR: Oni proponis konferencon de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la monda lingvoproblemo (CED). Konferenco pri la historio de Esperanto en 1985.

Hispanio: Hispana Esperanto-Federacio (HEF) provas oficialigi la instruadon de Esperanto en kromaj

lernejaj horoj. Oni starigas konstantan gazetaran servon, kun aparta amaskomunikila agado por 1987. HEF instigas fakulojn en lokaj grupoj entrepreni kontaktojn kun televidaj stacioj. Aperis broŝuro pri la agado de HEF, kiu inkluzivas stimuladon de la eldona agado en Hispanio, subtenon al la projekto de internaciaj preuniversitataj kursoj pri natursciencoj en Esperanto (Santiago de Compostela) kaj planadon de aparta informilo surbaze de verkoj de Pierre Janton kaj Ivo Lapenna.

Islando: Islanda Esperanto-Asocio planas eldoni islandan antologion.

Italio: Itala Esperanto-Federacio proponis organizi aŭd-vidajn kursojn kaj konstantan gazetaran servon, kun aparta amaskomunikila agado por 1987.

Japanio: Oni deziras aranĝi konferencon kunlabore kun Nacia Etnologia Muzeo. Konferenco pri socilingvistikaj aspektoj de internacilingvaj ideoj en Ôsaka en aŭgusto 1986.

Jugoslavio: Kroatia Esperanto-Ligo (KEL) aranĝos kun UEA festivalon sub la titolo "100 Jaroj de Esperanto-Kulturo", eventuale en kunlaboro kun Unesko. Ĝi inkluzivos prezentadojn de profesiaj teatroj, ankaŭ pupteatroj, dram-amatoroj, Esperantaj filmoj, televidaj dramoj (eventuale en formo de konkurso) kaj popoldancoj. Oni interesiĝas ankaŭ pri konkursoj de teatrogrupoj kaj pri la dek plej eminentaj Esperantaj literaturistoj. Krom tio KEL esploras la eblecojn okazigi du internaciajn simpoziojn: unu pri internacia kulturinterŝanĝo inter evolulandoj kaj duan laŭeble de kulturaj kaj lingvaj ministerioj de nealiancaj landoj. Apartan atenton KEL donas al produktado de unuaj lernolibroj en iuj afrikaj kaj aziaj lingvoj. Oni celas al diversaj ekspozicioj i.a. literaturaj. KEL entreprenas diversajn monakirajn agadojn por financi sian ampleksan jubilean agadon, inter kiuj troviĝas ŝtata loterio, subvencio de Unesko, futbalmatĉo, koncertoj, vendado de varoj kaj pentraĵ-aŭkcio.

Korea Respubliko: Internacia Festivalo por Orientazia Amikeco en aŭgusto 1986.

Malto: Esperanto-Societo (Malta) planas literaturan konkurson, kulturan vesperon, ekspozicion, apartan informadon al politikistoj. La societo krome esperas eldoni historion de la enlanda movado kaj maltlingvan biografion de Zamenhof.

Norvegio: Norvega Esperanto-Ligo (NEL) faras apartan penon por okazigi radio- aŭ/kaj televidajn

kursojn. NEL komprenas la gravecon de diplomitaj instruistoj, do klopodas starigi ekzamenon por instruistoj kaj atendas, ke la eduka ministerio oficialigos ĝin. Oni interesiĝas pri kadrokursoj por transdoni spertojn pri movadaj taskoj. La starigo de konstanta gazetara servo ludos ŝlosilan rolon en la informado. NEL tradukas la anglalingvan sociologian studon de Peter Forster *The Esperanto Movement* (La Esperanto-movado). NEL aranĝas, ke diversaj kasetoj estu prunteblaj en publikaj bibliotekoj.

Nov-Zelando: La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEA) financos sian jubilean agadon i.a. el sia fonduso J.T. Allan.

Pollando: La lando kompreneble estas la plej alloga por jubilea Esperanto-renkontiĝo, tiel ke en 1987 okazos ne nur la 72a Universala Kongreso de Esperanto, sed ankaŭ la 43a Internacia Junulara Kongreso, la kongresoj/konferencoj de Mondpaca Esperantista Movado (MEM), Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), sed ankoraŭ ne certe tiuj de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). Pola Esperanto-Asocio deziras aranĝi festivalon, simpozion pri problemoj en internacia lingva komunikado, kiel ankaŭ pri Esperanto mem, kaj kulturpopularigajn manifestaciojn. Okazos aparta gazetara agado por 1987. PEA eldonos antologion de pola prozo en Esperanto kaj antologion de pola poezio. PEA celas fondi centran Esperanto-bibliotekon kun arkivo kaj muzeo. Oni krome planas starigi monumenton al Zamenhof en Varsovio.

Svedio: Sveda Esperanto-Federacio (SEF) produktos i.a. la jenajn informilojn: serion de jubileaj afiŝoj en du koloroj, broŝuron kun enkonduka leciono, unuajn lecionojn de nova koresponda kurso, grandan serion de lumbildoj por helpi la informlaboron de lokaj kluboj kaj unuopuloj. La grupo, kiu skizas la informilon, montros la rezulton de sia laboro dum la ĉi-jara kongreso de SEF en Helsingborg.

Svislando: Kultura Centro Esperantista (KCE) starigas kunordigan centron por Esperanta edukado kaj celas okazigi samteman internacian konferencon en 1986. KCE organizos mondan bibliografian centron pri Esperanto, lige kun kiu oni kompilos bibliografion pri la Jubilea Jaro.

Usono: Esperanto-Ligo por Norda Ameriko (ELNA) eldonos ampleksan anglalingvan studon pri Esperanto kaj historion pri la enlanda movado. Ĝi disvastigos informcele la tekston de la konata letero pri Esperanto, kiun skribis Amerika Filozofia Societo en 1888. ELNA jam aperigis disponeblan televidan filmon pri Esperanto en kunlaboro kun konata televida prezentisto.

Venezuelo: Oni proponas aranĝi Internacian Festivalon pri Turismo, Komunikado kaj Kulturo en 1986.

Foto: Unuiĝintaj Nacioj



Fakaj asocioj

Fakaj asocioj, kiuj jam ellaboris jubilean programon estas Esperanto-Ligo Filatelista (ELF), Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE), Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA), Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE), Mondpaca Esperantista Movado (MEM), Veterana Esperantista Klubo (VEK), kiel ankaŭ la organizaĵoj Kultura Centro Esperantista (KCE) kaj Kooperativo Literatura Foiro. Ŝajnas, ke Espermenso, Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) kaj Tutmonda Esperantista Vegetarana Asocio (TEVA) intencas publikigi planon.

Esperanto-Ligo Filatelista planas materialon, kiu instigu konkursemon per Esperantaj filatelaĵoj en internaciaj kaj naciaj filatelaj ekspozicioj. Ĝi esperas eldoni apartan katalogon de Esperantaj poŝtmarkoj. ELF, Skytteholmsvägen 29, S-171 44 Solna, Svedio.

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio jam eldonis sian historion *Historio 1909-1984 (IFEF)* kaj entreprenas ĝian tradukon en naciajn lingvojn, kvankam ĝi ankoraŭ ne estas ĝenerale aĉetebla. Oni krome kompilas fakvortaron. IFEF oficiale petas

Forpasis d-ro Sinoda 1902-1985



La 7an de marto forpasis en Yamagata, Japanio, d-ro Sinoda Hideo. En 1979 la Komitato de UEA elektis lin Honora Membro.

Sinoda lernis Esperanton en 1927, dum siaj studentaj tagoj. En 1951 li kontribuis al la fondo de Jamagata Esperanto-Klubo. Li estis kuracisto, direktoro de Ĝenerala Hospitalo Sinoda en Yamagata. Dum multaj jaroj li subtenis la fakan agadon de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA). En 1955 li prelegis en Esperanto en pluraj eŭropaj universitatoj pri kancer-operacioj. Al *Medicina internacia revuo*, kiun li redaktis dum 1961, li kontribuis plurajn originalajn studojn. En 1964 li fariĝis prezidanto kaj en 1973 honora prezidanto de UMEA. Unu el liaj multaj gravaj agoj kiel mecenato estis starigi la ĉiujaran premion de UMEA por la plej bonaj fakaj artikoloj pri medicino en la Internacia Lingvo. Sinoda estis kundirektanto kaj poste konsilanto de Japana Esperanto-Instituto, ĉefdelegito de UEA por Japanio ekde 1963, delegito kaj fakdelegito en Yamagata.

kompetentajn instancojn pri la ebleco doni la nomon "Zamenhof" al internacia trajno inter orienta kaj okcidenta partoj de Eŭropo. IFEF, Ringstr. 14, D-3076 Lindhorst, FR Germanio.

Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista planas eldoni jubilean medalon kaj historion de la katolika Esperanto-movado. IKUE (Via Berni 9, I-00185 Roma RM, Italio) havas sian propran jubilean fondaĵon.

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kompilas bibliografion pri Esperantaj pedagogio kaj instrumetodologio. ILEI, CP 22, I-54100 Massa C., Italio.

Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj donos diplomon "Esperanto 100" pro atingo de cent radio-kontaktoj per Esperanto.

Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj organizos konkurson pri la plej bonaj artikoloj pri Esperanto kaj planas eldoni konsultlibron pri blindulaj aferoj. LIBE, Jovana Isailovića 40/32, YU-11210 Beograd, Jugoslavio.

Veterana Esperantista Klubo planas eldoni membrolibron. VEK, Oberstr. 8, D-3549 Wolfhagen, FR Germanio.

Kooperativo de Literatura Foiro planas starigi Esperanto-kursejon en Poitiers (Francio) kaj esperas okazigi esperantologian konferencon sur mediteranea krozŝipo.

Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) eldonis jubilean informilon kaj planas suplementon al *Plena ilustrita vortaro de Esperanto*.

Adresoj de la landaj jubileaj komisionoj:
Argentino S-ino Herminia Kirkerup de Fernández, Cerrito 1249, Be San Martin, RA-5000 Cordoba.
Aŭstralio Trevor Steele, 7 O'Callaghan Street, Holland Park, Qld. 4121.
Aŭstrio Walter Mudrak, Beatrisgasse 19/9, A-1030 Wien.
Belgio Marc Demonty, Montoyerstraat 37/B.24, B-1040 Bruselo.
Brazilo Carlos A.S. da Cunha, Alameda dos Maruas 471, BR-04068 São Paulo (SP).
Bulgario Hristo Gorov, Bul. Hristo Botev 97, BG-1303 Sofia.
Ĉeĥoslovakio Jaroslav Klement, Kpt. Nalepky 7, CS-360 04 Karlovy Vary.
Ĉilio Ivan Mättig, Cassilla 13828, Santiago.
Danlando Preben Bagger, Anemonevej 22, DK-4000 Roskilde.
Finnlando S-ino Terttu Tyynelä, Taidepolku 6.J, SF-40720 Jyväskylä 72.
Francio S-ino René Triolle, 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris.
Hispanio Salvador Aragay, Carreras Candi 36, Barcelona 28.

Hungario Imre Pethes, VI Népköztársaság útja 73, H-1940 Budapest.
Islando Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík.
Israelo Josef Murjan, POK 1289, IL-61012 Tel-Aviv.
Italio Augusto Rossino, Via del Torretto 44, I-19100 La Spezia.
Jugoslavio Internacia Kultura Servo, Amruševa 5/1, YU-41000 Zagreb.
Kamerunio Jean-Marie Mboge Mbele, BP 1816, Douala.
Kanado S-ino Louise Labelle, 10617 Oscar, Montreál, PQ H1H 5J8.
Madagaskaro Roger Randrianekena, BP 14, Ambatondrazaka.
Malto Carmel Mallia, 89 Sanctuary Street, Zabbar.
Nederlando S-ino L. de Jong-Robeek, Poelruit 13, NL-2771 RC Boskoop.
Norvegio Otto Prytz, Olaf Schous vei 18, N-0572 Oslo 5.
Nov-Zelando Donald Rogers, 44 Dowse Drive, Lower Hutt.
Pollando Stanisław Swistak, Skrytka poczt. 901, PL-30-960 Kraków 1.
Sud-Afriko Edwin de Kock, Posbus 513, RSA-0120 Pyravud.
Svedio Birger Viggen, Kvarnplan 1, S-175 41 Järfälla.
Svislando Lucerna Esperanto-Societo, Erlenstr. 58, CH-6020 Emmenbrücke.
Turkio Hayrettin Dural, Akin Sokagi 18/D-7, Suadiye, Istanbul.
Usono Tomas Goldman, 7008 Millwood Road, Bethesda, MD 20817.
Venezuelo J.E. Bachrich, Apartado 47675, Caracas 1041A.

REAGOJ

Absurda demando!

La demando, ĉu Esperanto estas nur ilo aŭ fakte lingvo, estas absurda! (Vd. *Esperanto*, p.10 kaj 44, n-roj 1 kaj 3/85.) Ĝi certe ne povas esti nur unu el la du, sed estas ambaŭ. Unu sen la alia tute ne eblas; kial do la problemo? Ĉar neesperantistoj ofte diras, ke Esperanto ne estas vera lingvo kaj do ne povas havi veran kulturon. Ni ridu pri tiu stulteco. Montru al ili la librokatalogon de UEA aŭ ekzemple la verkon *Esperanta antologio*.

Aliflanke ni konsciu, ke oni povas uzi sian nacian lingvon kiel ilon por altrudi (ofte erare nomata „disvastigi") ĝian kulturon. Ne eblas nei, ke ankaŭ tiu kultura imperiismo iusence estas "interna ideo", sed nia "interna ideo" estas kaj restos internacieco. Tio signifas, ke ĝi ĉiam ekzistos inter, do apud, la aliaj naciaj aŭ regionaj lingvoj, kiujn ĝi neniam klopodos malaperigi. Malgraŭ tio, ni preferas uzi Esperanton inter ni, ĉar nuntempe tio estas la ununura metodo por sufiĉe ekzerci ĝian uzadon.

Rimarkinde estas, ke aparte la antaŭe politike imperiismaj okcidenteŭropaj ŝtatoj Francio kaj Britio tiel forte alstrebas kulturan superregon per siaj naciaj lingvoj. Certe la provoj de Britio estas pli danĝeraj, ĉar apogataj de la granda potenco Usono. Tamen estas atentinde, ke el tiuj ŝtatoj ĝuste Britio havas la plej grandan nombron de Esperanto-apogantoj en la nacia kaj eŭropa parlamentoj!

P.H. van Terwisga (Nederlando)

UEA-kodo ***Skribante al la Centra Oficejo de UEA, bonvolu ĉiam mencii vian "uea-kodon". Tiel via peto estos pli rapide traktebla, ĉar serĉado de informoj, kontado, skribado de leteroj ktp. plej ofte okazas per tiu komputila kodo, kiu estas al vi unika. La kodo konsistas el kvar literoj, streketo kaj kvina litero (ekz. abcd-e), trovebla supre dekstre sur la adres-etikedo de via revukoverto. Dankon!***

Prijuĝi la lernilojn

Kun ĝojo mi legis la leteron "Fake juĝu la lernilojn" de s-ino Emilija Lapenna en la januara numero de *Esperanto*, ĉar ĝi pruvas, ke tiun laboron ja bezonas la Esperanto-instruistoj kaj lingvolernantoj.

La samon mi proponis jam en oktobro 1983 al la Konsulta Komisiono pri Edukado de UEA. Espereble ĉi-printempe ni povos kunordigi la laboron: kompili unuecajn vidpunktojn kaj dividi la lernolibrojn inter ni – kunlabore kun kompetentaj fakuloj – por trarigardi kaj prijuĝi tiujn, kiuj troveblas en la merkato. Ni intencas eĉ instigi la verkintojn de la plej bonaj lernolibroj kompletigi ilin per adekvata aŭdvida materialo, didaktika ludilo ks. Tiel ni havus kelkajn diversajn instrukompletojn, kiel abunde ekzistas tiaj por aliaj lingvoj.

La letero de s-ino Lapenna donas plian impulson por efektive komenci la jam antaŭviditan laboron. Dankon.

Zsuzsa Barcsay (Hungario),
ano de Konsulta Komisiono pri Edukado de UEA

FAKA AGADO

Interkibernetik '85

Post la sukceso de la internacia kongreso de komputistoj Interkomputo '82 fine de 1982, okazos Interkibernetik '85 de la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto ĉi-jare. Ĝi estos ankaŭ la unua kongreso de Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko (TAKIS). Grave helpas la preparojn la apogo de Internacia Kibernetika Asocio, kies sidejo estas en Namur (Belgio), Kibernetika Akademio Odobleja, Milano (Italio), kaj Franca Kibernetika, Elektronika kaj Teknika Societo (AFCET), Parizo.

La gastiganto de la kongreso estas la hungara nacia Komputoscienca Societo Johano Neumann – la



Interkibernetik '85 kunvenos en la sama konstruaĵo kiel Interkomputo '82: tiu de la organizaĵo Számalk.

organizinto de Interkomputo '82. Menciindas, ke tiu societo krome helpas en la redaktado de la kvaronjara Esperanta fakrevuo *Internacia komputado*.

Por Interkibernetik' 85 oni jam anoncis ĉirkaŭ 50 prelegojn – el kiuj po deko el Sovetunio kaj Ĉeĥoslovakio – sub la temoj antropokibernetiko, ĝenerala kibernetiko kaj sistemteorio, inĝeniera kibernetiko kaj biokibernetiko. La laborlingvoj estos Esperanto, la angla kaj la franca. El la provizora programo oni trovas prelegontojn el 12 landoj en tri kontinentoj: i.a. prof. Chen Yuan (Ĉinio), prof. Helmar Frank (FR Germanio), d-rinon Marieté Janot-Giorgetti (Francio), d-ron François Lo Jacomo (Francio), prof. Hristo Marinov (Bulgario), inĝ. Vladimir Nemec (Ĉeĥoslovakio) kaj prof. Osvaldo Sangiorgi (Brazilo).

Krom la prelegoj, okazos interkona vespero, ŝipekskurso sur la rivero Danubo, urborigardado kaj adiaŭa vespero kun dancado.

Pri la jam anoncita aŭskultantaro, rimarkindas la relative alta proporcio de aliĝintoj el malproksimaj landoj: multaj ekstereŭropanoj partoprenos unue en Interkibernetik '85 kaj poste en la Universala Kongreso en Aŭgsburgo.

Ankoraŭ eblas aliĝi al Interkibernetik '85. La kotizo estas 180 germanaj markoj, kio inkluzivas la kongresajn eldonaĵojn. Tranoktado por unu persono (kun matenmanĝo) en dulita ĉambro kostos ĉirkaŭ 80 germanajn markojn. La adreso de la organizanto estas: NJSZT – Interkibernetik '85, Pf. 240, H-1368 Budapest, Hungario.

PARLAMENTA AGADO

Sukcesa akcepto

En februaro la brita parlamenta premgrupo por Esperanto aranĝis sukcesan akcepton por parlamentanoj kaj aliaj en la parlamentejo mem. Aldone al 41 parlamentanoj, partoprenis pluraj reprezentantoj de eksteraj instancoj. Inter ili estis la fakestro pri modernaj lingvoj ĉe la politekniko South Bank, kiu esploras la eblecon enkonduki Esperanton en sian kolegion, reprezentantoj de la universitatoj de Leeds, Birmingham, Aston, Londono kaj la londona Kolegio de Orientaj kaj Afrikaj Studoj. La firmaoj Shell, Ford kaj ICA estis reprezentitaj de la estroj de siaj respektivaj lingvaj sekcioj, kiel ankaŭ la eldonejoj Linguaphone kaj Heinemann.

Kelkaj televidaj ĵurnalistoj, inkluzive de raportistino de la televida programo literatura "Bookmark" (Paĝindikilo, BBC2) troviĝis inter la gastoj. Ili aŭskultis bonvenigan paroladon de la prezidantino de Esperanto-Asocio de Britujo, Manjo Austin. La partoprenantojn alparolis ankaŭ parlamentano John Fraser, sub kies nomo la invitoj eliris.

Rekta sekvo de la akcepto estis, ke la ebleco starigi Esperanto-kurson por anoj de la Unua Ĉambro de la brita parlamento estas aktive konsiderata.

LANDA AGADO

Pozitiva eksiĝo

Okazas ja malofte, ke konvenas ĝoji pro iu movada eksiĝo, precipe se temas pri tuta landa asocio, kiu ĉesas kolektive membri en UEA. Tamen, ĝuste tia ĝojiga novaĵo venis lastatempe el Brazilo. Per sia letero de la 26a de februaro ĉi-jare, d-ro Alvaro Fausto de Souza, la nova prezidanto de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, komunikis al ni, ke tiu organizaĵo "rezignas de nun esti landa asocio en Brazilo, favore al Brazila Esperanto-Ligo, kiu tion rajtas kaj meritas."

Fondita en 1951, la Kooperativo aliĝis al UEA antaŭ ĉeko da jaroj, kiam la aktivado de la plej malnova (fondita en 1907) tiulanda movada organizaĵo, Brazila Esperanto-Ligo, estis minimuma kaj neniel kontentigis la dezirojn kaj interesojn de la brazila esperantistaro. Tra pluraj lastaj jaroj, la aktivado de la Ligo ĉiam pli kaj pli vigliĝis, dum tiu de la Kooperativo komencis stagni. Intertempe fondiĝis ankaŭ Brazila Konsilantaro de Esperanto, kiu dum kelkaj jaroj estis la plej aktiva movada organizaĵo en tiu lando. Tamen, jam de iom da jaroj montriĝis ĉiam pli ĝena la situacio en kiu UEA ne nur havis du aliĝintajn landajn asociojn en Brazilo sed malfacile povis rezisti la deziron de la tria – la Konsilantaro – aliĝi al UEA. Ankoraŭ pasintjare, dum la Universala Kongreso en Vankuvero, la Komitato estus devinta trakti aliĝpeton de la Konsilantaro, kvankam ĝi jam en 1983 rekomendis al la tri brazilaj Esperanto-organizaĵoj fari klopodojn unuigi siajn fortojn.

Nun la Kooperativo decidis reekzameni sian statuton kaj reveni al siaj originaj celoj: esti kooperativo kaj produktejo de la brazila esperantistaro, sen pretendoj kunordigi la tutan movadon naciskale. Ĝi do decidis ne kontraŭlabori la Ligon sed kunlabori kun ĝi, dividi kun ĝi la movadan taskaron en Brazilo. Tia decido estas tiel salutinda kiel imitinda en kelkaj aliaj landoj, kiuj suferas pro la interna movada malunueco.

ESPERANTO EN RADIO

Kion signifas "Universala Tempo"

Pluraj uzantoj de nia rubriko "Esperanto en radio" rimarkis la novan esprimon Universala Tempo (UTC), anstataŭ la pli frua Grenviĉa Meza Tempo (GMT). Ili scivolis, kion tio signifas (same kiel ni, cetere). La redaktoro do petis Georges Larglantier, la kompilanton de nia radio-rubriko, esplori la aferon, kion li plenumis kun sia kutima zorgo, eĉ vizitinte por ni la astronomian observatorion en Parizo.

En antaŭaj epokoj ĉiu urbo havis sian propran horon variantan laŭ la longitudo de la loko. Observado de la Suno sufiĉis por la ĉiutagaj laboroj. Neceso pri unuigita horo en ĉiu lando kaj fiksita rilato inter horoj de najbaraj landoj fariĝis pli evidenta dum la 19a jarcento pro evoluo de la vivmaniero kaj precipe pro neceso de taŭga funkciado de la naskiĝintaj fervojoj. La observatorioj de Parizo kaj Londono (Grenviĉo), fonditaj respektive jam en la jaroj 1667 kaj 1675, konkuris pri superregado de internaciaj aranĝoj.

La nomo Universala Tempo (UT/TU) aperis jam en la jaro 1925, kiam granda nombro de landoj difinis sian oficialan horon laŭ la meridiano de Grenviĉo, eventuale unu, du, tri... ĝis dek du horojn pli frue aŭ pli malfrue; tial la baza tempo havis la nomon Grenviĉa Meza Tempo (GMT, ankaŭ skribata TMG, GMZ... laŭ la lingvo uzata). Ĉi tiu horo rezultis el observado de la Suno je tagmezo super la meridiano de la observatorio, do estis esence astronomia. Por tempomezuroj unu sekundo estis difinita kiel 1/86 400 de meza suntago.

Astronomiaj instrumentoj kaj kalkuloj fariĝis pli kaj pli precizaj kaj elmontris, ke la rotacio de la Tero ne estas regula, ke ĝi estas tuŝata de aliaj movoj ne ĉiam antaŭvideblaj, kiuj modifas la daŭron de la tago. Konsekvence la tempounuo, la sekundo, ne povis havi firme fiksitan bazon, kiel la scienco postulas. Pro tio korektitaj universalaj tempoj estis difinitaj kun kodnomoj: UT.0, UT.1, UT.2. Samtempe venis en la jaro 1948 la ebleco konstrui multe pli precizajn tempomezurilojn per uzo de la atoma frekvenca normo de la kemia elemento cezio 133. Sukcesaj komparaj provoj okazis de 1955 ĝis 1967 kaj ebligis difini unu sekundon laŭ atoma frekvenco, kiu ne varias. La precizeco fariĝis milfoje pli granda. Tiu nove difinita tempo ricevis – laŭ internacia konvencio – la franclingvan nomon "Temps Atomique International" (TAI), tio estas internacia atoma tempo. Daŭraj komparaj astronomiaj observadoj elmontris, ke ĝi ankoraŭ devas esti iomete korektata. Tion oni faras, kiam necese, per aldono de unu sekundo komence de ĉiu jarduono.

La tiel definitive alĝustigita tempo, oficiale adoptita laŭ internacia scienca konvencio la 1-an de januaro 1972, ricevis la anglalingvan nomon "Universal Time Coordinated" (UTC), tio estas kunordigita universala tempo. La vorto "kunordigita" esprimas neniun originalan ideon, sed estis aldonita nur por distingi la novan nomon de la antaŭaj UT, UT.0, UT.1, UT.2.

Horo laŭ UTC estas kalkulata kaj diskonigata en la tutan mondon de Internacia Buroo pri la Horo (BIH), ĉe la Pariza Observatorio. Ĝi rezultas el konstanta komparo de tempomezuroj en diversaj partoj de la mondo. De la 1-a de januaro 1983 la konvencia esprimo UTC estas uzata en ĉiuj koncernaj medioj, interalie ĉe radiostacioj, post nova rekomendo de la lasta Internacia Konferenco pri la Horo. Ĉi tiu krome rekomendis la uzon de la nuraj literoj UTC en la fiksa ordo, kiu ajn estas la lingvo de la teksto aŭ de la parolanto (same pri TAI).

Evidente estas, ke por eksterscienca ĉiutaga uzo adopto de la novaj difino kaj esprimo nenion ŝanĝis en la funkciado de komunaj horloĝoj, sed la esprimo UTC fariĝis la sola uzota en ĉiuj cirkonstancoj.

Ĉi tiu teksto ne pretendas esti kompleta scienca esploro pri la temo. Ĉi tie ankaŭ ne estas loko por klarigi al nefakuloj la principon kaj funkciadon de atomaj tempomezuriloj. La celo estas nur konigi la kialon de la ŝanĝo de GMT al UTC kaj montri la kompleksecon de io, kio el eksterscienca vidpunkto aspektas tiel simpla... kiel la pendolhorloĝo de la praavino.

Georges Larglantier

INTERVJUO

Larĝe stimuli la sciencan diskutadon

Ĉiam gravas lerni, kion eminentaj lingvosciencistoj opinias pri Esperanto kaj al ĝi rilataj demandoj. Ni ĉi-sube resumas intervjuon kun la fama lingvisto profesoro Georg Friedrich Meier, faritan de d-ro Detlev Blanke por Der Esperantist. *Georg Meier estis direktoro de Instituto por Lingvoscienco ĉe Universitato Karl Marx en Leipzig kaj direktoro de Instituto por Fonetiko kaj Komunikada Scienco ĉe Humboldt-Universitato en Berlino. Kiel ĉefredaktoro de* Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung *(Revuo por fonetiko, lingvoscienco kaj esplorado pri komunikado) li aperigis multajn artikolojn kaj recenzojn pri interlingvistiko. Li krome estis gvidanto de centro por matematika lingvistiko kaj aŭtomata tradukado ĉe Sciencakademio de Germana DR. En 1946 oni eldonis lian verkon* Für oder gegen Esperanto *(Por aŭ kontraŭ Esperanto). De 1981 li gvidas Fakgrupon Interlingvistiko/Esperantologio de Esperanto-Asocio en Kulturligo de Germana DR.*

Prof. Meier opinias, ke "ni vivas en tempo de granda mortado de lingvoj. Jam post unu generacio estos mortintaj pli ol 400 lingvoj aŭ estos ankoraŭ uzataj nur en malgranda grupo kiel dua lingvo. Dum la 21a jarcento tiu ĉi mortado de lingvoj antaŭeniros gigantpaŝe. La kaŭzoj por tio ne aŭ apenaŭ estas la "lingvopolitiko", sed sociaj ŝanĝiĝoj, urbiĝoj, industriiĝo (centroj de almigrado), pliiĝo de lerneja klereco pere de skriblingvoj (ofte ŝtatlingvoj, interetnaj lingvoj), elmigrado de triboj el sekaj regionoj kaj detruita medio, lingva bazo de amaskomunikiloj kaj armeoj, densiĝo de la trafika sistemo, kaj per tio multaj mikskontaktoj malfavore al lingvoj de etaj malplimultoj."

Rilate la problemoj pri internacia planlingvo en la komunikadaj procezoj: "Krom la menciitaj socieko-nomie kaj hommedie kondiĉitaj... ŝanĝoj..., laŭ mi aldonendas du faktoroj. La informfluo reduktiĝos al kelkaj internacie bone enkondukitaj lingvoj, do al la angla, rusa, germana, franca, kiuj tial estas rekomendindaj kiel gravaj informadaj lingvoj por la fakulo." Due, "La jam menciita koncentriĝo de la monda loĝantaro en grandaj urboj kaj industriaj centroj tie neeviteble kondukos al la solvo de komunikada problemo, per la angla, hispana, portugala en Ameriko. Tie venkos aparte komunikkapabla lingvo... aŭ eble mikslingvo. Proksime parencaj lingvoj povus pliproksimiĝi. En kelkaj kazoj oni evoluigas interetnan aposterioran planlingvon, kiel ekzemple la indonezia aŭ la hebrea. En aliaj kazoj dominos ŝtata lingvo aŭ larĝregiona trafika lingvo, kiel la svahila en orienta Afriko... Restas nesolvita la problemo de la internacia komunikado skriba kaj buŝa. Tio signifas, ke multaj informoj el scienco kaj tekniko ankoraŭ devas esti tradukitaj kaj ofte atingos la akceptantojn nur kun malfruo. Ankaŭ la buŝa komunikado, kie kaj kiel ajn ĝi necesas, dependos ĉiam de tradukistoj tiel longe kiam en la lernejojn de ĉiuj landoj oni ne enkondukis komunikilon unuecan por ĉiuj homoj. Tie mi vidas la rolon de planlingvo. Ĝi helpus ŝpari miliardojn, elspezitajn pro informperdoj kaj por tradukistoj, kaj ĝi certe valore kontribuus al la paca interkomprenado de la homaro."

Rilate la signifon de Esperanto el lingvistika vidpunkto: "Malgraŭ multaj centoj da provoj ja nur Esperanto enkondukiĝis kiel internacia planlingvo. En 1946 mi okupiĝis pri ĝi aparte pro du kaŭzoj. Esperanto estis malpermesita de la nazioj, kaj multaj junuloj de mia generacio estis pri ĝi entute ne aŭ malĝuste informitaj. Krome, mi laboris post la milito kiel interpretisto kaj tradukisto kaj ofte spertis, ke la homaj kontaktoj estas malfaciligataj per peranto. Ankoraŭ influita de la terurajoj de la milito mi kredis, ke komuna internacia lingvo povus ankaŭ malkonstrui la sentojn de malamo. Hodiaŭ mi vidas la signifon de Esperanto kiel planlingvo facile lernebla aparte en la ebleco de rapida informado... Tre impresis min kiel dum Esperanto-renkontiĝoj gejunuloj de diversaj popoloj, sciantaj nur sian gepatran lingvon kaj Esperanton, povis konversacii pri ĉiuj demandoj, ludi, kanti kanzonojn ktp. ... la "lingvistika vidpunkto" certe estas malpli grava ol la praktika porpaca rolo. Dum la lastaj jaroj mi faris multajn konfrontajn studojn inter Esperanto kaj multaj aliaj lingvoj kaj venis al rezulto, por mi mem neatendita, ke la malriĉeco de leksiko kaj gramatiko – ofte riproĉita al Esperanto – tute ne ekzistas. La tre elasta vortfarado permesas krei ĉiun necesan vorton. Multaj fakoj kiel elektroniko, komputila tekniko, trafiktekniko, agronomio, medicino, lingvistiko – se mencii nur kelkajn ekzemplojn – jam disponas pri fidinda leksiko kaj pri multaj tekstoj. Se temas pri la gramatiko, kvankam ĝi estas simpla... la kombinado

de reguloj ebligas amason da nuancigoj. Laŭ mia scio ne ekzistas lingvo, kiu povas derivi de ĉiuj substantivoj, adjektivoj kaj verboj diminutivojn (malgrandigojn) kaj aŭgmentativojn (grandigojn) – se mencii nur tiujn kategoriojn. Kvankam la okcidenta eŭropano verŝajne pli facile komprenas kelkajn fenomenojn, kiel ekzemple la artikolon aŭ la plursignifecon de modalaj verboj, al aziaj esperantistoj ne konantaj artikolon aŭ kazojn, tio tamen ne estas malhelpo por la lernado de la lingvo.

Rilate la estontecon de la interlingvistiko, "ĝi devas unue profiliĝi... Laŭ mia opinio ĝi traktu la tutan kampon de la transnacia kaj internacia komunikado... Se temas pri esperantologio, ĝi en kelkaj landoj jam hodiaŭ estas enkondukita en altlernejojn, pro kio oni nun devus krei adekvatan studmaterialon. Krom tio, unu ĉeftasko de science laboranta esperantologo estas la plulaborado pri la evoluigo de fakleksiko kaj la okupiĝo pri la normproblemoj. Planlingvoj, unue ĉefe uzataj por la skribaj kontaktoj inter reprezentantoj de diversaj gepatraj lingvoj, emas ebligi la provon de vortkreaĵoj de diversaj flankoj. Tial la normigado estas tre grava."

Kiel prezidanto de Fakgrupo Interlingvistiko/Esperantologio en Kulturligo de Germana DR, prof. Meier opinias, ke ĝia ĉefa tasko estis kaj ankoraŭ restos dum longa tempo "larĝe stimuli la diskutadon pri la planlingvo kaj malkonstrui antaŭjuĝojn. Samtempe la seminarioj de Ahrenshoop multflanke iniciatis interlingvistikajn, socilingvistikajn, terminologisciencajn, lingvodidaktikajn, konfrontlingvistikajn kaj ankaŭ ĝenerale lingvistikajn diskutojn... Plia tasko de la fakgrupo estos kunagadi stimulige kaj gvide ĉe la pretigo de instrumaterialo kaj unuopaj studoj pri la planlingva problemaro kaj ties flankaj kampoj. Alia celo, ankoraŭ certe fora, estas iniciati verkadon de Esperantaj resumoj pri sciencaj laboroj."

Kongresa Komuniko

70a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Aŭgsburgo (FR Germanio)
3-10 aŭgusto 1985
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Adreso de LKK: Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FR Germanio.

Fakaj kunsidoj: La sekvaj fakaj organizaĵoj petis permeson aranĝi fakkunsido(j)n dum la UK. Se via faka asocio ne estas en ĉi tiu listo kaj vi opinias, ke ĝi devus aperi, bonvolu kontakti ties sekretarion. Mendiloj estas haveblaj de la konstanta adreso sed, ĉar la limdato nun pasis, ni ne garantias trakton de pliaj mendoj. (Ĉiuj ne klarigitaj mallongigoj troviĝas sur paĝo 416 de la Jarlibro): Akademio de Esperanto, AVE, BEL, Esperanto-Centro Paderborn, EGLI, ELF/AREK, EVA, FAT, Germana Esperanto-Asocio, IAdEM, IEKA, IFEF, IH, Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, IKEL, ILEI, ILERA, IPTEA, ISAE, Kooperativa Esperanto-Komisiono, KELI, KES, LIBE, MEL, Naturamikoj – sekcio de FR Germanio, Oomoto, SEL, Tutmonda Esperantista Bibliotekista Asocio, TEĴA, TEVA, UL, UMEA kaj VEK.

Karavanaj aliĝoj kaj loĝado: Se vi volas organizi grupvojaĝon al la UK kaj intencas grupe peti loĝadon de la Loĝiga Servo, la plej bona metodo por ĽKK estas ke vi kolektu la unuopajn loĝmendilojn kaj sendu ilin amase. Vi rajtas sendi nuran liston de nomoj, sed nepre aldonu la kongresajn numerojn de la mendantoj. Se vi sendos peton nur pri mendo de nombro da ĉambroj sen pliaj indikoj, LKK ne povos trakti ĝin. La adreso de la Loĝiga Servo estas: Lilienthalstr. 7/V, D-8900 Augsburg.

Se temas pri karavano, kiu ankoraŭ ne aliĝis al la UK, petu de la konstanta adreso ekzempleron de la Karavana Regularo kaj profitu de ties favora tarifo.

Invitiloj por kongresanoj kun vizaj malfaciloj: Skribu al la konstanta adreso (ne al LKK), se vi bezonas helpon. Ni aŭtomate sendas invitilojn al kongresanoj en difinitaj landoj. Krome, kiel ni jam anoncis en antaŭa kongresa komuniko, LKK sendis leteron al multaj ambasadoj en FR Germanio por instigi al glatigo de la formalaĵoj.

Afiŝoj kaj informiloj: Ĉe la konstanta adreso ankoraŭ restas stoko de la belega kongresa afiŝo, kiun ni volonte sendas al landaj asocioj, grupoj aŭ aliaj instancoj, kiuj petas tion. Principe ni ne sendos al unuopuloj.

Krome, la multkoloraj prospektoj pri la urbo Aŭgsburgo kaj pri FR Germanio, same kiel la Unua Bulteno, estas ĉiuj haveblaj. Nur mendu!

La Internacia Ĥoro serĉas volontulojn: Kun la oficiala subteno de la UK, Dimitr Terziev (ul. Milin Kamâk 58, BG-1421 Sofia, Bulgario) refoje konsisti-

gos la Internacian Ĥoron dum la kongresa semajno. Tiuj, kiuj volas anonci sin kiel potencialaj ĥoranoj, bonvolu jam nun skribi al s-ro Terziev.

Aŭtistoj: Tiuj, kiuj intencas stiri aŭton al la UK rajtas skribi al Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista pere de la konstanta adreso de la UK. Bonvolu aldoni internacian respondkuponon. Ricevintoj de la multobligita Kongresa Komuniko bonvolu noti, ke ne plu validas la menciita adreso pro la forpaso de s-ro Jean Guillaume.

Pupteatro en la Infana Kongreseto: Ombro-pupteatraĵo el Japanio estas unu el multaj distraĵoj, kiujn pretigas LKK por la Infana Kongreseto. Se vi havas infanon 6- ĝis 13-jaran, kiu scipovas Esperanton, nepre petu la aliĝilon por la 22a Internacia Infana Kongreseto.

Virina agado (seminario pri publika parolado): La Komisiono pri Virina Agado planas trisesian seminarion pri publika parolado. Ĝi celas virinojn, kiuj ne kutimas paroli antaŭ publiko, sed deziras spertiĝi en amika, senstreĉa etoso. Partoprenantoj havos la eblecon ekzerci sin per prezentado de mallongaj paroladoj. Por ke la grupo ne fariĝu tro granda, necesas limigi la nombron de la partoprenantoj al 20. Interesitoj skribu al s-ino Märtha Andréasson, Lilla Tolsered Pl. 2265, S-425 90 Hisings Kärra, Svedio.

Statistiko: Ĝis la mezo de marto aliĝis 1 475 homoj el 47 landoj. Pli ol kvarono (394) estas el FR

Dimitr Terziev el Bulgario denove organizas la Internacian Ĥoron dum la 70a Universala Kongreso

Germanio. Tio estas pli ol la duoblo de la plej proksima lando, Francio (185). Nur unu alia lando havas pli ol cent aliĝintojn, nome, Nederlando (132). Sekvas, laŭ vicordo, Italio, Svedio, Hungario, Usono, Belgio kaj Britio, ĉiuj kun pli ol 50. Aliajn nombre respektindajn kontingentojn liveros Finnlando, Jugoslavio kaj Japanio.

Recenzoj

Literatura evento

Saluton al la suno, Edwin de Kock (1930). Pretoria: la aŭtoro, 1983. 90p. Ilus. 21cm. ISBN 0 620 06716 0. Prezo: 13,20 gld.

Ĉiu nova poemaro de Edwin de Kock estas evento en nia kultura mondo, kaj plua paŝo por la Esperanta literaturo. Tiu ĉi granda poeto, jam pli ol dudek jarojn sur la scenejo, aŭtoro de neforgeseblaj atingaĵoj en nia versarto (ekzemple *Nostalgio*, *La konflikto de la epokoj* k.a.), denove engaĝas nin per tiu ĉi volumeto, kiu entenas 36 freŝajn majstroverkojn indajn je plej atenta kaj respektema konsidero.

Estas malfacile rakonti pri de Kock al tiuj, kiuj ne konas lian poezian disvolviĝon aŭ ne intimiĝis kun liaj tre personaj ritmoj kaj temoj. Lia unua (kaj, miaguste, ankoraŭ plej altnivela) poemaro, *Ombroj de la kvara dimensio*, eldoniĝis en 1961, kaj pruviĝis serioza ŝoko por la tiam ankoraŭ forta parnasismo. Oni kritikis lian "trokean" ritmon, oni riproĉis la "obskurecon" de iuj liaj metaforoj. La vero estas, ke de Kock laboris por efektive nuntempa poezio, kiu kompreneble trarompis la arkaikajn skemojn de la Esperanta idealismo. Liaj verkoj (kune kun tiuj de Auld kaj Ragnarsson) komencis epokon pli "aŭsteran" en nia literaturo, pli inklinan al filozofio kaj al lingva eksperimentado. Samtempe, liaj temoj brilas pro originaleco, kiu ŝuldiĝas al lia preskaŭa izoliteco en Sud-Afriko, al lia aparteno al tiu granda (kaj, por la plejparto de la esperantistoj, tute fremda) kontinento, kiun de Kock nomas "la umbiliko de mia esto".

Sed detala analizo de la temoj ĉe de Kock bezonus (kaj meritus) longan eseon. Do, jen nur kelkaj vortoj pri la recenzata verko. *Saluton al la suno* estas momento de helo kaj eksplicito en la panoramo de la poeto. Ĝi estas unu el tiuj verkoj, en kiuj aŭtoro decidas esprimi sin kaj sian poetikon senpere kaj sen multaj metaforaj vualoj. La suno en la titolo ankaŭ simbolas la optimisman elanon de poeto, kiun tamen iuj biografiaj eventoj kaj nesubpremebla persona inklino facile trenus al malgajo kaj pesimismo; ĝuste el tiu dialektiko, el tiu neevitebla kontrasto lia verstalento ĉerpas sian inspiron:

> *antaŭ ol min atingas uragano*
> *kun kiu oni ne rezonas, jen*
> *la spuroj de korspito lumsoifa.* (p.14)

"Lumsoifa" estas vorto, kiu taŭge priskribas la sintenon de Edwin de Kock fronte al la mondo. Li restas

suspektema pri la ideologioj, sed ĉiam strebas al iu supera sereno, al paco kaj ekvilibro:

Ĉar kio pli valoras ol sereno
en alta civilizo de ĝardeno? (p.60)

En tiu strebo konkretiĝas lia poezia kerno.

Kulture evoluintaj esperantistoj rekonos en ĉi tiu volumo unu el la plej seriozaj voĉoj de nia movado, unu el la fruktodonaj kreintoj de la moderna Esperanta stilo.

Mauro Nervi (Italio)

Debat-instiga kajero de sovetia interlingvistiko

Istorija i sovremennoe sostojanie interlingvistiki; Interlinguistica Tartuensis 3, red. Paul Ariste (1905) k.a. Tartu: Tartuskij Gosudarstvennyj Universitet, 1984. 183p. 22cm. Prezo: 18,00 gld.

Ni esperantistoj okupiĝas pri nenio pli volonte ol pri nia kara lingvo. Pro tio, kaj ĉar la cetera mondo malprave, sed persiste priridas ĝin, la okupiĝo pri Esperanto grandparte malhavas rektajn ligojn al la aktuala lingvistika debato, je ambaŭflanka malavantaĝo. Des pli ĝojige estas do, ke jam la trian jaron sinsekve Universitato de Tartu en soveta Estonujo aperigas en siaj Aktoj kajeron pri interlingvistiko.

La plej nova el ili kolektas sep artikolojn (en la rusa kun Esperanta, franca aŭ germana resumo) kaj unu recenzon (en la germana kun rusa resumo) pri "La historio kaj la nuna stato de la interlingvistiko". Duličenko enkonduke skizas la interlingvistikon en Sovetunio, ĉefe post 1956, pri kies riĉeco oni ĉi-okcidente malmulton scias (i.a. maldank' al tute subbezonaj eldonkvantoj, kiel 850 ekzempleroj de ĉi tiu artikolaro). La elstaraj nomoj reprezentu tiun ampleksan sciencan studadon: Bokarev, Ahmanova, Ariste, Grigorev, Svadost, Isajev, Kuznecov. Ĉi tiutrarigardo de multaj esplordirektoj tuŝas aron da problemoj gravaj por la teoria fundamento de interlingva scienco: la distingo inter tuthomara kaj intera ("helpa") lingvoj, la rilato inter planlingvoj kaj lingvoplanado aŭ la roldivido inter Esperanto kaj la rusa kiel interpopola lingvo en Sovetunio.

Kornilov analizas la kaŭzojn komuniki per interlingvo kaj la senkaŭzecon de kontraŭinterlingva sinteno. Maadla raportas pri la movado por revivigi la latinan, kiu pro forta konservemo apenaŭ proksimigas sian projekton al la bezonata facileco. Linnamägi resumas (apenaŭ vere recenzas) la konatan disertacion de Blanke (*Plansprache und Nationalsprache*, Berlino 1981).

Aparte interesa estas la studo de Kolker pri la rusa influo en la strukturo de Esperanto. Li kolektis amason da detaloj el pluraj branĉoj de la lingvistiko, kiuj estas speciale valoraj, ĉar ili montras neevidentaĵojn. Kolker implice asertas, ke lia studo estas pli fidinda ol tiuj de nerusoj, ĉar li pli profunde konas la rusan. Unuflanke li certe pravas pri tio, aliflanke tamen la rusaj okulvitroj igas kelkajn strukturojn pli rusaj ol ili estas. Amuza detaleto: Kolker (p.84) uzas unu pruvilon por ruseco, la vorton "elturniĝi", per kiu Gold pruvas jidecon ("Towards a Study of Possible Yiddish and Hebrew Influence on Esperanto", en *Miscellanea interlinguistica*, Budapeŝto 1980, p.318). Al la studo de Kolker Duličenko aldonas redaktoran noton. Konsiderante, ke tia paŝo grave malemfazas la memstaran valoron de la prinotita studo, mi ne komprenas, kial necesis la noto, konsistanta ĉefe el ĝeneralaj evidentaĵoj. Unu preterire menciita penso tamen tre pravas: Duličenko trafe rimarkas, ke necesus esplori la strukturon de Esperanto sciante tre multajn el la eblaj fontolingvoj samtempe. De tiu malatento suferas la studo de Kolker (kaj tiu de Gold).

Kuznecov skizas la historion de la interlingvista societo Kosmoglot(t), laborinta en Petrogrado (Leningrado) kaj Reval (Tallinn) inter 1916 kaj 1928. Ligitaj al ĝi estas famaj nomoj kiel von Wahl, Baudouin de Courtenay, Drezen, Stojan k.a., kaj el ĝi fontis aro da planlingvaj projektoj. Komparo al la Delegitaro kaj al IALA cerbumigas onin, ĉu nepre ĉiam, kiam grupo planas lingvon, okazas skismoj, perfidoj de la komuna afero ktp. Trovu ĉi tie facetoriĉan eron de la idehistorio el unuj el la plej gravokazaj jaroj de la eŭropa historio, tamen jen tute ekster la konataj politikaj sferoj.

Klubkov priskribas du pazigrafiajn projektojn (kaj Klubkova la samtempan kritikanton Vater) el la fino de la 18a jarcento (Maimieux, Wolke), kiuj rolis en tiutempa Rusujo. La artikolo povus ŝajni pure historie interesa, se ne la pazigrafio de Wolke, kiu devus funkcii per vortaroj el ĉiu lingvo al numerindekso kaj de tie al ĉiu lingvo, kondukus la pensojn unue al la filozofia planlingvo de Leibniz, due al la esperantista ideo pri la "ŝlosiloj", kaj trie – miru kaj gapu – per interligo kun frua plano de siaspeca telekso, al la nuntempa nederlanda projekto de komputila tradukado en videotekstaj retoj (vidu *Esperanto* 1/84, p.5).

Lingvistiko estas profunde internacia scienco, kaj interlingvistiko des pli. La ĉefa manko (krom la rabotindeco de la germanaj tekstoj) estas la tre mallarĝa ekstersovetunia perspektivo, el kiu rezultas ripetado de kontestitaĵoj, kiun diskutado de la internacia literaturo povus eviti. La kulpon portas, kredeble, ne nur la aŭtoroj, sed ankaŭ la sovetaj bibliotekoj.

Rapidu mendi vian ekzempleron de ĉi tiu valora kaj debatinstiga kolekto, sed ankoraŭ pli grave: mendigu ĝin al sciencaj bibliotekoj. Ankaŭ la antaŭajn du kajerojn, dum tio ankoraŭ eblas.

Klaus Schubert (Nederlando)

(La dua kajero ankoraŭ estas mendebla kontraŭ 15,00 gld. plus sendokostoj. Libroservo de UEA.)

De kie fontas la homa perfortemo?

La monto, István Nemere (1944). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984. 166p. 20cm. ISBN 963 571 140 9. Prezo: 16,50 gld.

Denove István Nemere pliriĉigis nian originalan prozon per romano facilstila. Supraĵe rigardate, la intrigo estas simpla: ie staras granda Monto, sur kies supro loĝas eta grupo da homoj. Iam, dum milittempo, tien supreniris kvaropo soldata, neniam retrovita. Post multaj jaroj, majoro ricevas la ordonon de siaj superuloj, fari enketon surloke pri la malaperintoj. Tiel okazas.

Sian rakonton la aŭtoro vestas en lingvaĵo tre simila al la parola kutimo, sen superfluaj literaturaj balastoj. Tamen, neniel ĉi tiu konstato implicas, ke estas ĝene aŭ tede legi la verkon: ĉarmas la freŝa prezentado, kuntreniĝas la fluo de la okazaĵoj, kaptas – kvazaŭ subtere – la intriganta ekpenso pri la baza intenco de Nemere. Ĉu vere nur distraĵon li celis, kiel povus aspekti, aŭ ĉu pli fundamente li celas pensigi pri nia homa naturo, pri emoj jen noblaj jen rekte murdistaj, kiujn havas en si supozeble ĉiu homo certagrade? Mi estas konvinkita, ke ne havus sencon, se ĉi tiun aŭtoron oni rubrikus nur sub la vortoj "amuza, legaĵo". Malgraŭ la stila simpleco, la enhavo tre seriozas: funde temas pri la demando, de kie devenas la homa perfortemo. Por tiun demandon reliefigi, la verkinto tre trafcerte scias eluzi la – por tiel diri – senkulpecan etoson de la eta homgrupo surmonta, kiu vivas ja for de, kaj do neinfektite de la morala malpureco de la "ĝenerala mondo". Precipe impresas agrable, ke nek la idealbildo nek la kontrasta vivo de la submontanoj lokeblas en rekonebla mondparto: la tuto povus okazi kie ajn, kondiĉe nur, ke ekzistus tie samtia Monto...

Bedaŭrinde mi devas aldoni kelkajn kritikojn. Kama, kies patro sur paĝo 27 estas Paredo, aliloke estas la filino de s-ro Lerat. Krom tio, sub nacilingva influo, la hungara aŭtoro plurfoje forgesis la subjekton en subpropozicioj samsubjektaj kiel la ĉefpropozicio: ekz. sur paĝo 38: "Sed kiam [li] iris en la alian arbaron, li vidis...". Feliĉe tamen, tio ne ĝenas la komprenon. Al la eldonintoj mi volonte rekomendas iom pli regulan presadon; kelkaj paĝoj vere estas tro pale presitaj. Ĉi tiuj malglataĵoj tamen neniun detenu de aĉeto kaj eklego. Al la verkisto oni nur povas deziri, ke li daŭrigu...

Gerrit Berveling (Nederlando)

Laste aperis...

Apliko de Esperanto en scienco kaj teĥniko 1984, div. aŭtoroj. Brno: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 1984. 175p. Tabeloj. Mimeo. 29cm. La 21 prelegoj pri perspektivoj de la monda nutraĵ-produktado kaj problemoj de la fakaj lingvaĵo kaj tradukado el internacia seminario en Brno (31 aŭg.-2 sept. 1984). Prezo: 12,00 gld.

Brava Kolombido, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20p. Kolorilus. de la kompilinto. 21cm. Fabeloj de Ĉinio. Hana fabelo, "Brava kolombido", kaj ujgara fabelo, "Pavo, kiu scipovas nur sin ornami", reverkitaj por infanoj, kun grandaj kolorbildoj. Prezo: 3,00 gld.

Bukedo al vi; Mikronoveloj, div. aŭtoroj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto Eldonejo, 1984. 95p. Ilus. 18cm. Dudek kvar noveletoj el la ĉina gazetaro pri la ĉiutaga vivo de ordinaraj ĉinoj. Prezo: 3,00 gld.

Corrigé des exercices, Pol Denoël (1912). Wilrijk: Eldonejo-Librejo Sonorilo, 1985. 1+16p. Mimeo. 21cm. Solvoj al la ekzercoj de la lernolibro *Initiation théorique et pratique* (1934). Prezo: 7,20 gld.

Dek ses urboj de Ĉinio. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 176p. Ilus. 19cm. Ampleksaj priskriboj de la ĉefaj urboj de Ĉinio, kun koloraj kaj nigra-blankaj fotoj. Prezo: 7,80 gld.

Du katetoj, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20p. Kolorilus. de la kompilinto. 21cm. Fabeloj de Ĉinio. Tibeta fabelo, "Du katetoj", kaj ĝinpoa fabelo, "Bovo kaj bubalo", reverkitaj por infanoj, kun grandaj kolorbildoj. Prezo: 3,00 gld.

Elementa kurso de Esperanto, Venlo Fon (Feng Wenluo). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 354p. Tabeloj. 19cm. 24-leciona gramatikmetoda lernolibro por ĉinlingvanoj, kun ekzercoj kaj solvoj. Prezo: 18,00 gld.

Esperanto, je vraagt maar, Claude Piron (1931). El la franca trad. P. Kempeneers. Antverpeno: Vlaamse Esperantobond, 1985. 23p. 21cm. Respondoj al la plej oftaj demandoj pri Esperanto (nederlanda). Prezo: 5,70 gld.

Heliko kaj ĝia domo, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20p. Kolorilus. de la kompilinto. 21cm. Fabeloj de Ĉinio. Ĝuanga fabelo, "Heliko kaj ĝia domo", kaj bujia fabelo, "Aroganta orfiŝo", reverkitaj por infanoj, kun grandaj kolorbildoj. Prezo: 3,00 gld.

Initiation à l'Espéranto, An Kaŭ (pseŭd.). Laroque Timbaut: Cercle espérantiste agenais, 1985. 43p. Mimeo. 21cm. Ele-

menta kurso de 11 lecionoj por franclingvanoj, kun 400 radikoj, sen ekzercoj. Prezo: 2,40 gld.

Kokido venĝis sian panjon, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20p. Kolorilus. de la kompilinto. 21cm. Fabeloj de Ĉinio. Mjaŭa fabelo reverkita por infanoj, kun grandaj kolorbildoj. Prezo: 3,00 gld.

Kvin noveloj, Friedebert Tuglas (1886-1971). El la estona trad. (1924) Henrik Seppik. Tallinn: Eesti Raamat, 1984 (2a eld.). 127p. Ilus. de Ivi Raudsepp. 17cm. Verkoj el la jaroj 1914-1925 de korifeo de la estona novelarto, karakterizaj pro arta kompakteco kaj perfekteco de la formo; kun antaŭparolo de August Eelmäe. Prezo: 9,00 gld.



Lulkanto al tempo turmentata/Kehtolaulu kiusatulle ajalle, Reino Eriksson (1940). Iisalmi: la aŭtoro, 1984. 99p. Ilus. de Tuula Tamminen-Patja (1944). 15cm. Dulingva: Esperanto-finna. La dua poemaro dulingva de la aŭtoro, "pri la velvetu-rado en la dimensiojn de la homa menso, inspirita de la forta emocio de la profunda pensulo". Prezo: 33,30 gld.

Lutro kaj bufo, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20p. Kolorilus. de la kompilinto. 21cm. Fabeloj de Ĉinio. Jia fabelo "Lutro kaj bufo", kaj dahura fabelo, "Abeloj kaj apro", reverkitaj por infanoj, kun grandaj kolorbildoj. Prezo: 3,00 gld.

Magia ŝipo; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 75p. Ilus. 18cm. Ses fabeloj de la plej granda nacio en Ĉinio, la hanoj. Prezo: 3,00 gld.

Mia vivo, div. aŭtoroj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 127p. Ilus. 19cm. Dudek personaj rakontoj pri la vivo de tre diversaj ĉinaj civitanoj. Prezo: 3,60 gld.

Montara vilaĝo (1974), Chun-Chan Yeh (Ye Junjian/Cicio Mar). El la angla trad. William Auld (1924). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 264p. 22cm. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 21. Historia romano, jam tradukita en multajn lingvojn, pri la okazaĵoj en vilaĝo dum la ĉina revolucio de 1927, de konata aŭtoro kaj tradukisto, kiu verkas ankaŭ Esperante. Prezo: 16,50 gld.

Ne nur leteroj de plum-amikoj; Esperanta literaturo – fenomeno unika, Marjorie Boulton (1924). Malmö: Eldona Societo Esperanto, 1984. 63p. 20cm. ISBN 91 85288 06 3. Malpeza enkonduka verko pri aspektoj de la Esperanta literaturo: la Esperanta verkisto, poezio, prozo fikcia kaj nefikcia, dramo, tradukoj, konsiloj al komencantoj; nacilingven tradukinda. Prezo: 12,90 gld.

Noveloj, André Maurois (1895-1967). El la franca trad. Roger Bernard (1907), Raymond Gonin (1914) kaj Hervé Gonin (1947). Parizo: Unuiĝo Franca por Esperanto, 1984. 68p. 21cm. Aparta literatura numero de *Franca esperantisto*, n-ro 356. Dek tri noveloj de verkisto "inteligenta, racionalisma-moralisma"; kun biografio. Prezo: 9,00 gld.

Papilia fonto; Ĉinaj popolaj rakontoj. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 67p. Ilus. 18cm. Unu baja, unu ujgura, unu taja kaj du ĝŭangaj fabeloj. Prezo: 3,00 gld.

Petolema kaprido, komp. Ĝan Tong. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 20p. Kolorilus. de la kompilinto. 21cm. Fabeloj de Ĉinio. Mongola fabelo, "Petolema kaprido", kaj taja fabelo, "Soriko kaj cervo", reverkitaj por infanoj, kun grandaj kolorbildoj. Prezo: 3,00 gld.

Plena vortaro Esperanta-ĉina/Shijieyu-Zhongwen Dacidian, Feng Wenluo. Pekino: Zhongguo Shijieyu Chubanshe, 1984. 4+915+8p. 16cm. Bind. Unudirekta vortaro kun prok. 15 mil serĉvortoj, kun mallongigoj. Prezo: 45,00 gld.

Rozmówki esperanckie, Andrzej Pettyn (1937). Varsovio: Polski Związek Esperantystów, 1985. 247p. 14cm. ISBN 83 7013 010 0. Ampleksa laŭtema frazaro pola-Esperanta, kun afiksaro, mallongigoj kaj gramatika skizo. Prezo: 15,00 gld.

Senmortigaj fruktoj, komp. Mej Jing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 64p. Kolorilus. de la kompilinto. 18cm. Bildrakonto por infanoj, laŭ filmo pri la mitologia romano *Pilgrimado al la Okcidento* (Wu Cheng-en, 16a jc.). Prezo: 5,40 gld.

Serĉi panjon, adaptita de Han Xing. El la ĉina. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 25p. Kolorilus. de Jiang Cheng'an kaj Wu Daisheng. 17cm. Bildrakonto pri kortobirdoj, por tre junaj infanoj. Prezo: 2,40 gld.

Diversaĵoj:

Initiation théorique et pratique à la langue internationale Esperanto, Wilrijk: Eldonejo-Librejo Sonorilo, 1985. Kaseto, por akompani la samtitolan lernolibron. Prezo: 10,80 gld.

Kio estas USSR? El la rusa trad. D. Perevalov kaj M. Lineckij. Moskvo: Novosti (APN), 1984. Duflanka faldfolio. Kolorilus. 66×45cm. Bela plenkolora informilo pri diversaj sociaj aspektoj de Soveta Unio, inkluzive de la Esperanto-movado. Prezo: 2,10 gld.

Mapo de la Ĉina Popola Respubliko. Pekino: Kartografia Eldonejo, 1984. Duflanka faldfolio 77×54cm. Profesie produktita multkolora mapo kun esperantigita (neoficiala) transskribo de nomoj kaj trikolumna indekso (esperantigita, oficiala, ideografiaĵa) malantaŭe; en tenilo el plastigita papero. Prezo: 2,70 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Loke

● **Aŭstralio:** En januaro aperis raporto de la Komitato pri Edukado kaj Arto de la aŭstralia Senato, kiu studis la problemon de nacia lingvo-politiko. La raporto substrekis la gravecon konservi la kulturojn de enmigrintoj kaj la aborigena malplimulto. Ĝi rekomendis, ke ĉiu aŭstralia infano lernu almenaŭ unu lingvon aldone al la angla en la lernejo. Ĝi krome notas la gravecon de la japana, ĉina, indonezia kaj rusa lingvoj por Aŭstralio. Esperanton la raporto mencias en listo de lingvoj (la itala, hispana, franca kaj germana), proponitaj por studado kiel ĝenerala lingva preparado, ĉar ne eblas antaŭdiri, kiun lingvon certa infano bezonos kiel plenkreskulo. En gazetara komuniko la prezidinto de Aŭstralia Esperanto-Asocio, Ralph Harry, diris i.a., ke la planata pli granda ŝtata elspezo por instruado de malplimultaj kaj fremdaj lingvoj, kiel ankaŭ la starigo de konstanta konsilantaro, povos helpi klopodojn disvastigi la Internacian Lingvon.

● **Brazilo:** La 7an de januaro je la 19h15 la due plej populara televida kanalo en Brazilo elsendis en sia ĉiutaga kulturĵurnalo *Manchete panorama* 5-minutan programon pri Esperanto. La programeron oni filmis en la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo (BEL). La 28an de januaro la sama programo elsendis duan 5-minutan programeron pri la Internacia Lingvo, ĉi-foje en la posttagmezo. Ambaŭ programeroj ŝuldiĝis al tio, ke BEL regule sendas sian informilon *Esperanto notícias* al gravaj redakcioj.

● De la 17a ĝis la 21a de julio okazos en Belo Horizonte la 21a Brazila Kongreso de Esperanto. La kongreso estos sub la aŭspicioj de Brazila Esperanto-Ligo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto, superrigarde de Nacia Esperanto-Komisiono (vd. ankaŭ sub nia rubriko "Landa agado").

● **Britio:** La 24an de aprilo la tutnacia brita televida kanalo BBC2 elsendos programeron pri la Esperanta beletro en sia regula priliteratura programo *Bookmark*, en kiu partoprenos i.a. William Auld kaj Marjorie Boulton (vd. ankaŭ sub nia rubriko "Parlamenta agado").

● **Kubo:** Lastatempe Kuba Esperanto-Asocio anoncis la formiĝon de kvinmembra Lingva Komitato, kies celo estas prizorgi "la lingvan fundamenton, enkonduki diskutojn, analizojn kaj solvojn rilate al gramatikaj problemoj de la Internacia Lingvo".

● Kuba Esperanto-Asocio intencas okazigi internacian foiron de Esperanta literaturo en julio ĉi-jare. La asocio petas alsendon de elmontrindaj Esperantaj libroj, eventuale kontraŭ promeso ilin resendi. Bonvolu sendi la librojn al Kuba Esperanto-Asocio, Apartado 2018, Habana 2, Kubo.

● **Bulgario:** En la novembra numero (p.182) ni, laŭ artikolo el *Bulgara esperantisto*, raportis pri eksperimenta deviga instruado de la Internacia Lingvo ĉe Mezlernejo "Vasil Levski" en Sofio. Por la unua lernojaro elektis studi la Internacian Lingvon 40 gelernantoj.

● De la 14a ĝis la 18a de novembro Esperanto-Kursejo en Pisanica la duan fojon okazigis kurson por esperantistaj ĵurnalistoj. Al 20 kursanoj Dončo Hitrov instruis kiel prezenti ĉiuspecajn materialojn por la gazetaro.

● **Ĉinio:** Nun en Ĉinio estas tuta aro da universitatoj kaj aliaj altlernejoj, kiuj instruas Esperanton devige aŭ nedevige. Al la listo de 20 altlernejoj (kiuj inkluzivas Orient-Ĉinian Instruistan Universitaton, Centra-Ĉinian Instruistan Instituton, Universitaton de Siĉuano, Universitaton de Chengdu, Universitaton de Jinan, Ŝanhajan Fremdlingvan Instituton, Universitaton de Anhui, Universitaton de Wuhan kaj Universitaton de Lanzhou), pasintjare aldoniĝis ankaŭ Universitato de Shandong, Universitato de Xiamen, Universitato de Fudan, Uni-

Foto: R. Resende



● **Brazilo: De la 4a ĝis la 9a de februaro la Esperanto-societo en Brazilio okazigis gramatikan kaj pedagogian kursojn por Esperanto-instruistoj. Partoprenis 50 personoj el sep brazilaj ŝtatoj, el kiuj kelkaj vojaĝis pli ol 2 500 kilometrojn. Gvidis la kursojn prof. Geraldo Mattos parte surbaze de sia aperonta 600-paĝa gramatiko de Esperanto. Sukcesis en la gramatika ekzameno 22 personoj kaj en la pedagogia ekzameno 17 personoj. La gazetaro de Brazilio plurfoje atentis la aranĝon. En la foto prof. Mattos transdonas al Néia Lúcia, prezidantino de Esperanto-Asocio de Brasília (EAB), instru-ateston, dum dekstre ridetas Lêda Gama, sekretariino de EAB.**

versitato de Junnano, Politekniko de Dalian, Politekniko de Hefei, Agronomia Instituto de Fujian, Ĉinmedicina Instituto de Jiangxi, Instruista Universitato de Shandong kaj Fremdlingva Kolegio de Hefei. La kursoj daŭras unu aŭ du jarojn dum tri aŭ kvar horoj semajne.

● La 1-an de februaro aperis sur la frontpaĝo de la anglalingva ĵurnalo *China Daily* raporto sub la rubriko "Lernantoj svarmas al Esperanto-klasoj". Oni skribis, ke en Ĉinio estas nun pli ol ducent mil lernantoj de la Internacia Lingvo.

● **FR Germanio:** La venontaj Kulturaj Semajnfinoj de Sarlanda Esperanto-Ligo (SEL) okazos de la 8a ĝis la 10a de majo kaj de la 6a ĝis la 8a de decembro en la moderna konferencejo Kardinal-Wendel-Haus en Homburg. En la unua semajnfino Claude Gacond de Kultura Centro Esperantista en Svislando prelegos pri la vivo kaj verkaro de la fondinto de UEA, Hector Hodler (1887-1921). Okazos ankaŭ diversaj kursoj. En decembro prelegos pri la originala poezio en Esperanto Baldur Ragnarsson, estrarano de UEA pri kulturo. Pliajn informojn sendas SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt, FR Germanio.

● **Irlando:** Esperanto-Asocio de Irlando lastatempe eldonis la irlandlingvan broŝuron *An Cás do Esperanto* (la argumento por Esperanto). Ĝin verkis Risteard Ó Glaisne, kiu estas renoma irlandlingva verkisto i.a. de biografio de la politikisto kaj pastoro Ian Paisley.

● **Japanio:** Esperanto-Societo de Meguro en Tokio grave rolis en la Kultura Festivalo de la kvartalo Meguro per sia Esperanta ekspozicio la 17an kaj 18an de novembro. Krom ĝenerala prezento pri Esperanto kaj vidbenda prezento de la pupteatraĵo *Issunbosi*, ludita en Esperanto de la teatro Musubiza, la atenton de ĉirkaŭ 300 vizitantoj altiris la rezultoj de enketo pri loĝkondiĉoj en 20 landoj. La materialon la societanoj kolektis pere de Esperanto. Pli frue ili enketis pri polucio.

● **Jugoslavio:** De la 30a de junio ĝis la 21a de julio okazos Intensa Seminario kun lingvaj, literaturaj kaj movadtemaj kursoj, kaj de la 6a ĝis la 8a de septembro okazos la unua Trilanda Renkontiĝo de esperantistoj el Hungario, Rumanio kaj Jugoslavio. Ambaŭ renkontiĝojn organizas en Palić Esperanto-Societo Subotica (Trg cara Jovana Nenada 3, YU-24000 Subotica, Jugoslavio).

● **Régulo: La magistrato de la urbo La Laguna, Kanariaj Insuloj, nomis profesoron Juan Régulo Pérez (sub la flago), faman movadan eldoniston kaj Honoran Membron de UEA, Adoptita Filo kaj samtempe donis lian nomon al placo de la urbo. En la sama akto Universitato de La Laguna simbole transdonis al Régulo libron, kiun ĝi ĉi-jare eldonos lige kun lia emeritiĝo. Temas pri plurvoluma verko, al kiu kontribuis ankaŭ kelkdeko da esperantologoj. Régulo dankis per parolado, kiun la magistrato poste eldonis kiel *De una adopción y un homenaje* (Pri adopto kaj omaĝo). Kompreneble aperas en la libro sekcio pri la longa esperantista vivo de Régulo, kiu nun verŝajne estas la sola vivanta esperantisto kun placo oficiale nomita laŭ li.**

● **Malto:** Esperanto-Societo (Malta) informas nin, ke Esperanto estis uzita apud la malta, angla, itala kaj franca lingvoj en la legado de konkurs-poemoj dum internacia artkonferenco en Valeto fine de decembro. Krome, okaze de Semajno de Internacia Amikeco en februaro, la societo okazigis literaturan kaj vinkukan vesperon, kune kun du aliaj kulturaj societoj, kaj transdonis premiojn al gajnintoj de speciala maltlingva eseokonkurso pri paco kaj la Internacia Lingvo.

● **Nederlando:** Okaze de la 50-jara ekzisto de la Esperanto-monumento en Den Burg, sur la insulo Texel, la Esperanto-kluboj de Alkmaar kaj Den Helder okazigos renkontiĝon de la 1-a ĝis la 2a de junio. La kontaktadreso estas Treilerstraat 11, NL-1784 SW Den Helder, Nederlando.

● **Norvegio:** La 7an de marto okazis duonhora intervjuo pri Esperanto en la programo "Je ĉi tio mi kredas" de la norvega ŝtata televida kanalo Program 1. La intervjuito estis s-ino Elna Matland, kiu poste ricevis multegajn telefonvokojn por pliaj informoj.

● Dum la pasinta jaro 80 diversaj norvegaj gazetoj aperigis sume 234 artikolojn aŭ notojn pri Esperanto. Multaj el la longaj artikoloj aperis kun bildoj, tiel vekante pli da intereso.

● **Sovetunio:** Ĝis 1981 troviĝis en la respubliko Belorusio nur unu Esperanto-klubo en Minsk. Nun jam de pli ol jaro estas kvin Esperanto-kluboj: du en Minsk, kaj po unu en Brest, Vitebsk kaj Grodno. Tiuj grupoj de tempo al tempo organizas interklubajn aranĝojn.

● **Svedio:** La sveda poŝto baldaŭ eldonos libron por helpi svedojn korespondi en Esperanto. La libron, kiu titoliĝas *Kor(r)espondu Esperante/Skriv brev på esperanto*, verkis s-inoj Inga Johansson kaj Åsa Sahlquist. Ĝi jam mendeblas kontraŭ 14 svedaj kronoj ĉe la poŝta revuo *Skriv & Berätta* (Skribu kaj rakontu), poŝtĝirkonto n-ro 185-9.

● **Vjetnamio:** La ĵurnalo de la urbo Hochiminh *Saìgoǹ G.P.* kaj la semajna gazeto *Dai Doàn Keť* siatempe aperigis artikolojn pri la budapeŝta Universala Kongreso kaj Esperanto-eldonaĵoj de la verkistoj Nguyên Haí Trùng kaj Nguyên

Dô Khánh. En la urbo Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio (VPEA) kaj la Esperanto-klubo aranĝis Zamenhof-Tagon kun kultura programo kaj ekspozicio.

● La fremdlingva fakultato kaj buroo por teknika scienca informado de Universitato de Cân Thó pasintjare okazigis kursojn de Esperanto por instruistoj kaj studentoj. De marto 1984 gvidas d-ro Lê Phuoć Nam.

● En Tuyên Quang oni fondis Esperanto-klubon en Medicina Altlernejo de la provinco Hàtuyên. Tie instruas d-ro Dinh Huy Hân.

● **Zairio:** La 10an de decembro oni fondis la Esperanto-klubon D-ro Zamenhof en Kinŝaso (adreso: S-ro Kilembika, BP 2392, Kinshasa 1, Zairio). Ĝi komencis elementan kurson kun dek gelernantoj. Estas ankaŭ du aliaj Esperanto-kluboj en la urbo.

● Aldone al la jam disponeblaj unufoliaj informiloj pri Esperanto en la lingala kaj konga lingvoj de Zairio, pasintjare tradukitaj de Tufuene Mafuila, nun ekzistas traduko ankaŭ en la luba lingvo, farita de Kalembue Tshibambe Panda. La luban parolas proksimume tri milionoj da homoj en sudorienta Zairio.

● **Lernolibroj:** Aparte grava novaĵo estas la apero de presita lernolibro por ruslingvanoj: *Učebnik jazyka esperanto* de V.Z. Semenova kaj M.I. Isajev. La 265-paĝan ilustritan libron, kun dudirekta vortareto kaj longa antaŭparolo, eldonis Lingvistika Instituto de Scienca Akademio de Sovetunio kaj Asocio de Sovetiaj Esperantistoj en 30 000 ekzempleroj. Ĝi jam estas aĉetebla de UEA kontraŭ 21 guldenoj plus sendokostoj.

● **Ekologio:** Unu el la politikaj movadoj, kiuj lastatempe altiris al si atenton en okcidenta Eŭropo estas la tiel nomataj „verduloj". Ĵus aperis provnumero de bulteno de Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE), *Aveno*, redaktita de Christopher Fettes el Irlando. Oni celas eldoni la bultenon kvaronjare. La adreso de la asocio estas AVE, p/a J.-Claude Thumerelle, Place de la Station 16, B-7790 Warneton, Belgio.

Bele

● **Blinduloj:** Komence de marto aperis la brajla eldono de *Plena analiza gramatiko de Esperanto*. Ĝi konsistas el dek grandformataj volumoj. Dank' al multaj donacoj, la prezo estas nur 55,00 gld. de LIBE, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando (poŝtĝirkonto n-ro 5357176 aŭ, kun aldono de bankkostoj, Rabobank Beverwijk 1073-06336).

● **Foiroj:** Ĉiujare aperas bela Esperanta afiŝo de Internacia Specimena Foiro de Milano, Italio. Jen la simbolo de la



63a Internacia Specimena Foiro, kiu okazos ĉi-jare de la 14a ĝis la 23a de aprilo. Ĝia adreso estas Fiera di Milano, Largo Domodossola 1, I-20145 Milano, Italio.

● **Informadiko:** De la 1-a ĝis la 6a de julio okazos en Bretonio internacia (dulingva: franca kaj Esperanta) semajno pri informadiko. Profesiaj fakuloj instruos la komputilan instrukcikodon Basic, kun praktikado per mikrokomputiloj. Pliajn informojn sendas s-ro C. Bertin, 60 allée de la Renaudière, F-35510 Cesson-Sevigne, Francio.

● **Interlingvistiko:** Fine de 1985 aperos ĉe la eldonejo Akademie-Verlag en Berlino, Germana DR, tre ampleksa libro de d-ro Detlev Blanke. Ĝia titolo estos *Plansprachen in Theorie und Praxis* (Planlingvoj en teorio kaj praktiko). La libro estos prok. 350-paĝa, kun 77 ĉapitroj kaj subĉapitroj kaj tre ampleksa bibliografio.

● La duan fojon okazis Urala Konferenco pri Planlingvoj en Tjumena Ŝtata Universitato kun partopreno de dek kelk regionaj esperantistoj kaj studentoj de lingvistiko sub la gvido de la supera lekciisto el la filologia sekcio, O.I. Usminskij. Oni planas trian konferencon por aprilo ĉi-jare en Universitato de Perm.

● **Junularo:** Ĵus aperis la unua numero de *Kvinpinto*, komuna gazeto de la esperantista junularo de la kvin nordaj landoj: Danlando, Finnlando, Islando, Norvegio kaj Svedio. La unuopaj junularaj organizaĵoj en tiuj landoj nun ne plu eldonos proprajn bultenojn, kio estas bela ŝparo de laborforto. *Kvinpinto* siatempe estis la nomo de la organo de Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo. Nun la kvin pintoj alprenis plian signifon. La adreso de *Kvinpinto* estas PL 64, SF-83501 Outokumpu, Finnlando.

● **Fervojistoj:** Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj (JAFE) estas unu el la plej fortaj landaj sekcioj de la faka organizaĵo Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF). JAFE ĉi-jare festas du jubileojn: 60 jarojn de Esperanto inter jugoslavaj fervojistoj kaj 30 jarojn de JAFE mem. Tiuokaze ĵus aperis bela kaj bone redaktita broŝuro *Esperanto na JŽ* (Esperanto ĉe Jugoslaviaj Fervojoj), kiu sur trideko da paĝoj skizas la historion, nunan staton kaj estontajn taskojn de tiu faka organizaĵo. Venontjare JAFE organizos la 38an Kongreson de IFEF en la makedona ĉefurbo Skopje en Jugoslavio.

● **Festivaloj:** Svedaj Esperanto-organizaĵoj anoncis, ke okazos de la 16a ĝis la 19a de majo 1986 Kultura Esperanto-Festivalo en la malnova studenta urbo Uppsala, norde de Stokholmo. Oni nun kunmetas la programon kaj petas la kunlaboron de kompetentaj artistoj. La adreso estas: Kultura Esperanto-Festivalo, Esperanto-Centro, Brunnsgatan 21, S-111 38 Stockholm, Svedio.

● **Poezio:** La unua pasintjara numero de la sveda poezirevuo *Lyrikvännen* (La lirik-amiko) publikigis la poemon "Mamuta ĉaso" de Leif Gunnar Nordenstorm, paralele kun sveda traduko. La poemo gajnis la duan premion en la Belartaj Konkursoj de UEA en 1983.

● **Teatro:** Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE) anoncis la datojn de sia 3a

Internacia Kanzona kaj Teatra Festivalo. Ĝi okazos la 23an kaj 24an de novembro ĉi-jare. Interesitoj povas ricevi pliajn informojn de UFE (Internacia Festivalo), 4 bis rue de la Cerisaie, F-75004 Paris, Francio.

● **Vortaroj:** De post 1910, kiam aperis Esperanto-kimra ŝlosilo, ne aperis alia Esperanta vortaro por kimroj. Tamen en la ĉi-jara Brita Kongreso de Esperanto, kiu okazos en la nord-kimra urbo Llandudno, oni lanĉos la unuan dudirektan Esperanto-kimran vortaron. Ĝin kompilis d-ro John Wells, lekciisto pri fonetiko ĉe Universitato de Londono. La vortaro havas proksimume tri mil enskribojn por ĉiu lingvo. Wells estas la kompilinto ankaŭ de la plej uzata dudirekta vortaro Esperanto-angla.

● **Tendumado:** Sep tagojn da piedirado kaj tendumado okazigos la Esperanto-societo de Crest, Francio, de la 17a ĝis la 23a de junio. Informas s-ro René Debernardi, 8 rue des Oulières, F-26400 Crest, Francio.

Personoj

● **Auld:** En la literatura suplemento *Kmen* (Trunko) de la oficiala gazeto de ĉeĥaj verkistoj, *Tvorba* (Kreado, 100 mil ekz.), la 13an de februaro aperis mallonga artikolo kun foto pri la Esperanta literatura agado de William Auld, honore al lia pasintjara 60-jara datreveno. La artikolon verkis Jiři Karen.

● **Karucin:** Krâstju Karucin, estrarano de Bulgara Esperantista Asocio kaj antaŭe ĝia sekretario, ano de la Lokaj Kongresaj Komitatoj de la 48a kaj 63a Universalaj Kongresoj de Esperanto en Sofio kaj Varna, ricevis la altan ŝtatan ordenon "Popola Respubliko Bulgario" de la unua grado. Tiuokaze li ricevis gratulleteron de la ŝtatestro de Bulgario, Todor Živkov, kiu skribis: "Per via sindona socia agado vi kontribuas al la prospero de la esperantista asocio en nia lando".

● **Röllinger:** La 24an de februaro Hugo Röllinger el FR Germanio, laŭ invito de Esperanto-Societo de Tenerifo, denove prezentis ĉe Universitato de San-Fernando en La Laguna prelegon kun lumbildoj, ĉi-foje pri "Tut-anĥ-Amun, la egipta trezoro el eburo kaj oro". Ankaŭ multaj neesperantistoj aŭskultis la prelegon. Röllinger cetere estas la aŭtoro de statistika esploro pri la stratoj, placoj kaj monumentoj, kiuj portas la nomojn "Esperanto" aŭ "Zamenhof". Tiu statistiko de 449 nomigoj en 29 landoj de kvar kontinentoj aperos kiel Esperanto-dokumento de UEA. Interesitoj povas intertempe mendi ĝin de la verkinto kontraŭ kvin internaciaj respondkuponoj: Hugo Röllinger, Theresienstr. 23, D-873 Bad Kissingen, FR Germanio.

● **Thatcher:** La brita ĉefministrino, Margaret Thatcher, letere salutis la 69an Britan Kongreson de Esperanto (5-8 aprilo) per la vortoj: "Pro la daŭra progreso de la teknologio ni hodiaŭ povas ekpreni telefonon kaj paroli al preskaŭ iu ajn parto de la mondo, klare kaj rapide. Ni povas paroli, sed tre ofte ni ne povas komuniki. Komunikado dependas aŭ de reciproka kompreno de la lingvo aŭ de la posedo de komuna lingvo. La lingvo nun estas la plej granda baro kontraŭ komunikado kaj komprenado, dividante la mondon, kaj ĉiaj kaj ĉiuj penoj por superi ĝin meritas kuraĝigon. La paco, komerco, kulturaj ligoj kaj tiom da aliaj aferoj dependas de nia kapablo povi paroli unu kun la alia. Via kongreso havas la meritoplenan celon plibonigi internacian komprenadon per la forigo de lingvaj baroj, kaj mi bondeziras al vi en viaj diskutoj."

Diversaĵoj

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ
Britio: Geoffrey Wood. Jugoslavio: J.-A. Jelovšek. Usono: Pastro Daniel Gorham.

SOCIETO ZAMENHOF 1984
Belgio: André Degryse.

SOCIETO ZAMENHOF 1985
Aŭstralio: Tim Einihovici; L.V. Scott; Marjorie Duncan; Margaret Chaldecott; Ralph Harry; Sylvia Burkitt. Aŭstrio: Grete Breunlich. Belgio: Elfriede Ernst; Germaine Wolff; Jules Verstraeten; L. Drèze. Brazilo: Elvira Fontes; Álvaro Rabêlo. Britio: Ian Jackson; John Brownlee; Wilfrid Atkinson. Danlando: Ejnar Hansen; P.O.P. Andersen. Finnlando: Aarne Ratalahti; Harri Tuomola; Niilo Kavenius; Veikko Tikkanen; Vuokko Heinäsuo. Francio: Alexandre Maczkowski; Eija-Liisa Chevalier; Gaston Waringhien; Henri Dabezies; Jean-Paul Beau; Odette Bernet. FR Germanio: Harry Bily; Bruno Vogelmann; Ellen Eggers; Elise Woller; Erdmann Fritsch; Martin Gründler; Erich Gunkel; Helene Hiebel; Hans Schütt; Julie Winter; Richard Hirsch; Richard Schulz; Ruth Paintner-Trumpp; Wilhelm Treude; M. von Waldowski. Italio: Medardo Biagi; Michele Mariano. Japanio: Nakazima Kyôhei; Yamazoe Saburô; Wilhelm Schmid; Simizu Kôiti; Sugano Takeo; Hosonuma Syozi; Kuwahara Tosihide; Nisikawa Toyozo. Jugoslavio: Jožica Židanik. Kanado: Dorothy Hawley; Edward Woodruff; Betty Salt. Luksemburgio: Brian Moon. Meksikio: Julie Regal. Nederlando: Evert Woessink; Elly Kervers-van Tholen; Gerard Peet; Jenneke Dunnewold-Ehrmann; John Rapley; J. Soeteman; Louise Adelaar; H.C. Luijke; Truus Mantingh; Elsa Otto; S.A.K. van der Zee; Akiko Woessink-Nagata; Simon Smits; W. Rodenhuis; Gerda Wulfers-Meddens. Norvegio: Agnete Anjer; Kjell Gustavsen; Kjell Peder Hoff; Ludvig Anjer; Margrete Landmark; Olaf Maeland; Pepita de Caspary. Nov-Zelando: D.J. Langman; V.R. Moore; Jeannie Wilson. Svedio: Amy Nilsson; Bertil Bengtsson; Brita Nylén; Gunnar Börjesson; Edla Nilsson; Einar Rasmussen; Elly Persson; Gustav Nygård; Harald Andersson; Henrik Karlsson; Jim Hornö; Karl Lagerkrantz; Leif Holmlund; Olle Olsson; Olle Persson; Ragnar Hjorth; Sven Sundin; Tore Fors; Tore Johansson; William Malmsten. Usono: Frederik Belinfante; Bruce Arne Sherwood; Charles Tustin; Ĝiĝi Harabagiu; Thomas Goodman; Humphrey Tonkin; Ken Thomson; Lucille Harmon; L.A. Walther; Margaret Barkley; Milton Brown; Moshe Lewin; James Parkerson; Robert Swenson; William Solzbacher; Douglas Swett; Victor Palermo; William Harmon; William Schulze.

DONACOJ 1985 (Gld.)
ĝis la 12a de marto

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Finnlando: S-ino Terttu Österman 70,05;

Aarne Ratalahti 21,55. Israelo: David Mager 15,00. Japanio: Yamamoto Sintarô 36,45. Nederlando: Robert Moerbeek 100,00. Svedio: Esperanto-Klubo de Norrköping 404,12. Sumo ĉi-jara 1 441,62.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Brazilo: Victor Sadler 50. Hispanio: Adam Goralski 1 250; Maria Pi Cuchi 100. Venezuelo: Ezio Guerra 100; Terensio Monticelli 50; Leonardo Rojas 50; Felix Corrada 50; F-ino Zobeida Lavite 50; J. Moreno Perez 100; Alberto Solarz 50; Ivo Schenkel 100. Sumo ĉi-jara 1 950 us.$.

ĜENERALA KASO: Francio: René Lemaire 73,66. FR Germanio: S-ino A. Cropp 22,66; H. Spirat 25,77; S-ino H. Kühnel 12,73. Anonime 400,00. Sumo ĉi-jara 3 560,75.

ASOCIO KAPITALO: Heredaĵo Horace Barks 207,35. Sumo ĉi-jara 207,35.

BUDAPEŜTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: S-ino R. Paintner-Trumpp 452,00. Nederlando: Robert Moerbeek 50,00. Sumo ĉi-jara 1 412,72.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Nederlando: M. Meijwes 200,00. Sumo ĉi-jara 215,79.

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Britio: D-ro Nassif Isaac 73,00. Kanado: S-ino Dorothy Hawley 2 061,44. Sumo ĉi-jara 12 145,04.

NOVJORKA OFICEJO 1985

KLUBO 777 (minimume $777): Usono: Humphrey Tonkin. PATRONOJ (minimume $100): Argentino: Rafael Diaz Morilla. Finnlando: Helvi Jaakkola; Tapio Sormunen. Francio: Henri Roy; Renée Volpelière. FR Germanio: Bertil Englund; Heinrich Nischwitz; Werner Heinrich; Wilhelm Treude. Japanio: Isizaki Bun'iti; Tenon-kyô Oomoto; Sakurai Nobuo; Kuwahara Tosihide. Kanado: Dorothy Hawley; Petro Collinge; Betty Salt. Meksikio: Julie Regal. Usono: Bern Wheel; Patricia Egan-Brownstone; Hiram Reed; Lanna Cheng; Mary Murray; Ralph Lewin.

SUBTENANTOJ (minimume $25): Aŭstralio: Tim Einihovici; F.F. Koppel; Teresa Metherall; Ydys Einihovici. Aŭstrio: Gottfried Hofstätter. Belgio: Herman Deceuninck; Maurice Borguet; Stella De Weerd; Angelos Tsirimokos. Brazilo: Cleber de Moraes Lemos. Finnlando: Hemmo Tietti; Juho Pyykonen; Esperanto-Societo "Antaŭen"; Terttu Österman; Veikko Tikkanen; Veera Tietti; Vuokko Heinäsuo. Francio: Martial Barry; Centre Culturel d'Espéranto Dijon; Eliane Lo Jacomo; Fernand Boyet; François Lo Jacomo; Pierre Guérout; Jean Gibaux; Jean Guillaume; René Lemaire; Louise Marin; Maximilien Trenner; Roger Despiney; Roger Blanc; Sonia Amariglio. FR Germanio: Hans Georg Strauss; Hermann Teichmann. Hispanio: María Pi Maynar. Japanio: Yamaga Isamu; Koga Sirô; Kitabatake Hitomi; Hosonuma Syozi. Kanado: G. Ewart Brown; Myra Larsen; W.D.B. Hackett. Nederlando: Jenneke Dunnewold-Ehrmann; Robert Moerbeek. Nov-Zelando: S.H. Dodds; Jeannie Wilson. Svedio: Tore Johansson; Esperanto-Societo de Uppsala. Svislando: Konrad Rey-Zollinger. Usono: Apollo Wu; Cleo Fort; Bernice Garrett; Gizella Giguere; Horace Bryce Hand; Lura Chapman; William Schulze.

AMIKOJ (minimume $10): Aŭstralio: Gerald Tumman; John Moore. Belgio: Esperanto-Grupo Verviers. Brazilo: Luiz Mario Santos da Silva. Finnlando: Kalevi Hölttä; Unto Seppälä; Yrjö Hiltunen. Francio: Cercle Biterrois d'Espéranto; Daniel Luez; Antoinette Eyssautier; François Delay; Fernand Vurpillot; Emilienne Gallon; Gabriel Rougetet; Jacqueline Trésorier; Jean Dalet; Jean Bertrand; Jean Jacques Kasparian; Jeannine Vincent; Louise Lemaire; Michel Portal; Marcel Pruvost; Petro Cugny; Paulette Naullet. FR Germanio: Herbert Busch; Helga Erhard; Joachim Giessner; Rudolf Brand; Richard Wluka. Japanio: Endô Takasi; Hakamada Tosio; Yamamoto Sintarô. Kanado: Crawford Baker; Jean Smythe. Norvegio: Alf Reidar Grødaland; Douglas Draper; Kjell Peder Hoff. Nov-Zelando: Rita Aagaard. Svedio: Amy Nilsson; Eugen Rytenberg; Henrik Karlsson. Usono: Donna R. Stitz; Lydia Tabor; Margaret Hagler; Nicole Wing; Philip Chenoweth; Rudolf Couppez; Vivi Couppez.

PATRONOJ DE TEJO 1985

Argentino: Fernando Casella; Luciano Paff. Aŭstralio: Gerald Tumman. Belgio: Stella De Weerd. Francio: Barbara Despiney; Marcel Jullien; Pierre Cheynet. FR Germanio: Franz Knöferl; Günther Becker; Didier Izacard. Hispanio: Miguel-Angel Altuna Aspiazu; Ada Fighiera-Sikorska; Ana Montesinos de Gomis; María Pi Maynar. Italio: Carla de Lorenzi; Clara Gubbioli Carioli; Sergio Martina; Giuseppina Picciotto De Vita; Norberto Saletti. Japanio: Agô Takasi; Mikuni Eizirô; Isizaki Bun'iti; Sibayama Zyun'iti; Koga Sirô; Simuzu Kôiti. Jugoslavio: Peter Zlatnar. Nederlando: F.J. Pieterson-Kruger; Jenneke



Diskriminacio **prelegoj kaj komentarioj**

La Esperanto-movado kontraŭbatalas la lingvan kaj kulturan diskriminacion. *Diskriminacio* diskutigas ankaŭ pri aliaj diskriminacioj kaj donas proponojn por agado i.a. en klubvesperoj.

Diskriminacio traktas ⋆ la radikojn de diskriminacio ⋆ diskriminacion kontraŭ etnoj kaj rasoj ⋆ internacian ekonomian diskriminacion ⋆ diskriminacion kontraŭ virinoj ⋆ diskriminacion pro seksa orientiĝo ⋆ diskriminacion pro religio ⋆ maldiskriminacion kaj ⋆ lingvan diskriminacion.

Diskriminacio; Prelegaro el la 65a Universala Kongreso de Esperanto, red. Renato Corsetti. Rotterdam: UEA, 1984. 175p. 21cm. ISBN 92 9017 031 X. Prezo: 21,00 gld.

Dunnewold-Ehrmann; Jenny Heetkamp-Senstius; J.S. Douma; J. Soeteman; Louise Adelaar; Pieter Portegies; Willem Roelofs; R. Vetter; Henk Schippers; W.L. van Leeuwen. Norvegio: Ludvig Anjer; Margrete Landmark. Nov-Zelando: D.J. Langman; Frank Swift; V.R. Moore; Jeannie Wilson.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Anoncetoj

Tarifo: *ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

Instruisto de Esperanto 29-jara deziras interŝanĝi Esperantajn gazetojn kaj lernolibrojn. S-ro Huang Tingsheng, Yangqiaolu 72, Gulouqu, Fuzhou, Fujian, PR Ĉinio.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia Feria Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Interesitoj pri bredado kaj nomado de novaj orkideaj floroj kontaktu: Orkidea Esperantujo, ĉe Universalaj Geviroj, Box 607, Saipan, CM 96950, Usono.

Unika plurlingva kompara Esperanto-leksikono en 120-paĝa broŝuro. Afrankite: 22 frankoj aŭ 8 irpk. Ligue Française "Pro Unesco", 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Pĉk 16.233.37 C Paris.

22-jara pola studento pri elektrotekniko deziras korespondi. S-ro Mieczysław Szydłowski, ul. Ogrodowa 5/4, PL-65-461 Zielona Góra, Pollando.

Lingvaj demandoj: Se tio vin interesas, aliĝu al IUEF, kaj vi ricevos la revuon *Filologo*. Jarkotizo 7,00 gld. al la okcidenta peranto s-ro R. Moerbeek (UEA-kodo robm-b), Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam, Nederlando. Poŝtĝirkonto n-ro 1156545.

Pri hundobredado deziras serioze korespondi amatora bredisto de francaj buldogetoj. S-ro Andreo Błaszczyk, ul. Przodowników Pracy 73/2, PL-53-325 Wrocław, Pollando.

Konu Kolombion per lumbildoj kaj filmoj, kiujn – dum traeŭropa vojaĝo komencota fine de aprilo – kolombia kursgvidanto prezentos al ĉiu grupo antaŭpetinta tion de s-ro Jerley Sabogal, AA:889 Armenia (Quindio), Kolombio.

Interesitoj pri ideoj, kiuj produktas laboron aŭ monon por esperantistoj, kontaktu: Klubo de Inventistoj, ĉe Universalaj Geviroj, Box 607, Saipan, CM 96950, Usono.

Hola gesamideanoj! Se por vi Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo, skribu al Info-Servo, Bismarkstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Ni havas ion interesan por vi!

Tri vere internaciaj muzikistoj planas mondturneon, kaj donus klasikajn koncertojn kun Esperanta fono en Esperanto-kluboj. Interesitoj kontaktu: Mondturneo, ĉe Universalaj Geviroj, Box 607, Saipan, CM 96950, Usono.

15a Amikeco-Kongreso sen paroladoj: Gray, Francio, malnova urbeto kun Esperanto-Muzeo. 15-21 julio 1985. Intima etoso. Skribu al s-ro Pierre Delaire, BP 2002, F-45010 Orléans, Francio.

S-ro Delaire, ĉi-supra adreso, serĉas ĉiulandajn ĉiuaĝajn gekorespondantojn por siaj gelernantoj. Skribu al li indikante viajn preferojn. Li ne respondos, sed transdonos la leterojn al interesitoj.

Ĉiuj, kiuj deziras havi, kaŝe aŭ malkaŝe, Esperantan idon, kontaktu: Projekto Habel, ĉe Universalaj Geviroj, Box 607, Saipan, CM 96950, Usono.

De la fino de mia biciklovojaĝo mi atestas: "Dank' al la rememorado de tiu karcerulo, pri kiu jam Tolstoj atestis, ke li posedas 'la ŝlosilon de la paco', la vualoj de la tiraneco fendiĝis, kaj mi ekvidis la sunon de la justeco de Dio sur la monto Karmelo." La bildrakonton pri tiu mirinda biciklovojaĝo (en Esperanto subtitolita) oni mendu por 10 sv. fr. (aŭ 7 internaciaj respondkuponoj) de "Bonan tagon", Postfach 1010, CH-2501 Biel, Svislando.

Nekrologoj

WINIFRED ADDIS (1909-1984) mortis la 23an de decembro en Aŭstralio. Ŝi estis dumviva membro de UEA kaj iama delegito en Adelaide.

ANTÓNIO RODRIGUES CORREIA (1905-1985) forpasis en februaro en Coimbra, Portugalio, kie li estis gvidanto de la loka Esperanto-movado kaj delegito. Li plurfoje gvidis kursojn i.a. por studentoj. Li estis membro de 1940.

HAROLD FILLINGHAM (1897-1985) mortis la 19an de februaro apud Nottingham, Britio. Li partoprenis la 7an Universalan Kongreson en 1911.

ANTONIO GAMBOA SÁNCHEZ (1903-1985) mortis la 31an de januaro en Valladolid, Hispanio, kie li estis la delegito, fakdelegito pri turismo kaj vicprezidanto de la Esperanto-grupo.

KLAAS KOS forpasis en januaro en Callantsoog, Nederlando. Li estis dumviva membro de UEA.

CAROLINA MINIO PALUELLO MINNAJA (1903-1984) mortis fine de la pasinta jaro en Romo, Italio. Ŝi kunlaboris por la Esperanto-elsendoj de la radiostacioj de Romo kaj Vatikano. Ŝi estis membro de UEA ekde 1938.

HANS JOACHIM PLEHN (1905-1985), inĝeniero, forpasis la 10an de marto en Wieselburg, Aŭstrio. Li lernis Esperanton en 1922 kaj poste laboris 40 jarojn sub la fama terminologo kaj esperantologo Eugen Wüster (1898-1977). Ekde 1931 li estis ĉi ties "redaktisto-oficisto" ĉe la kompilado de *Enciklopedia vortaro Esperanto-germana* (A-K, 1923). En 1934 aperis la kvinlingva segilterminaro de Plehn, kiu poste estis direktoro de Segilfabriko Wüster. Plehn ricevis i.a. la ordenon Arĝenta Signo de Honoro de la Respubliko Aŭstrio. Li estis delegito de UEA ekde 1950.

F. SCHMIDHEINY mortis antaŭ nelonge en Balgach, Svislando. Ŝi estis dumviva membro de UEA.

GERHARD ZIEGLER forpasis pasintjare en Osnabrück, FR Germanio. En 1981 aperis ĉe la eldonejo Bleicher lia traduko *Elektitaj satiroj* de Efraim Kiŝon.

RADIOTEKNIKA ARTIKOLARO

★ 23 altnivelaj fakaj artikoloj pri tre diversaj radioteknikaj temoj
★ abunde ilustrita per fakaj figuroj kaj grafikaĵoj
★ kun terminareto kaj listo de eldonaĵoj
★ 64 paĝoj, plus 20 paĝoj da fakaj anoncoj

Redaktis László Szilvási. Eldonis Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto, 1984. 24cm. ISBN 963 571 166 6. Prezo: 7,50 gld. plus sendokostoj. Mendu ĉe Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Respondoj al la eta pasint-monata kvizo pri

kontakto

1. Svedio ne troviĝas inter la dek superaj landoj laŭ pagintoj por *Kontakto*! La menciitaj landoj trovas sian lokon jene: Jugoslavio (1), Hispanio (4), Irano (6), Ruando (10).

2. Francio ne troviĝas inter la kvar superaj landoj laŭ la nombro de la Individuaj Membroj de TEJO! La menciitaj landoj rangiĝas jene: Japanio kaj FR Germanio (1=), Irano (2), Belgio (3). Francio okupas la kvaran lokon.

3. Esplorado ne estas temo por *Kontakto* en 1985. Ĝi jam estis temo en 1984. La temoj estas:

1/85 Lingvo kaj lingvoj	2/85 Afriko
3/85 Internacia Junulara Jaro	4/85 Antikvo kaj moderno
5/85 Amikeco	6/85 Akvo

Ses konvinkaj argumentoj rapidi aboni *Kontakto* por 1985. Aŭ se vi jam tion faris, kialoj abonigi kolegon aŭ kursanon! Faru nun!

URĜA ALVOKO: La sola espero rilate la solvon de la mondvastaj problemoj estas la reveno al la bibliaj instruoj. Por ricevi senpagan libreton kun fascinaj detaloj, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH 17 7LN** aŭ, se ekster Eŭropo al: **P.O. Box 373, Baronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

LA ROBAIOJ

de Umar Kajjam (ĉ.1045-ĉ.1122)

Poezia ĉefverko de la mondliteraturo, tradukita el la persa de Gaston Waringhien, kun ampleksaj antaŭparolo, enkonduko kaj notoj,

Antverpeno/La Laguna/Chapecó: TK/Stafeto/Fonto. 107 paĝoj, 21 cm. ISBN 90 3660 032 0. Prezo: 12,00 gld. plus sendokostoj. Rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Esperanto und Wissenschaft

Zur Plansprachenproblematik
de Detlev Blanke

Elstara informilo por lingvosciencistoj. Informriĉa germanlingva skizo, kiu science traktas planlingvojn, interlingvistikon, la planlingvon Esperanto, kun bibliografioj de sciencaj verkoj.

Eld. Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Berlino, 1982 (represo). 88p. 21cm. Prezo: 12,00 gld. de la sola distribuanto Libroservo de UEA (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).

Emistudio estas kanada Esperanto-kooperativo kies kunlaborantoj estas membroj de la familio du Temple

EMISTUDIO

Nova Produkto: Emistudio anoncas la UNUAN KASETON DE VESELIN DAMJANOV: TITOLO: VESELIN DAMJANOV KONCERTAS EN KANADO.

La kaseto prezentas operajn ariojn, popolkantojn, kaj kanzonojn ne troveblajn ĉe diskoj. Profesie registrita en teknike plej moderna studio kun kolora bildo de la kantisto, la kaseto havas falditan enfermaĵon kun tekstoj de la Esperantaj kantoj. La kaseto estas unika donaco por neesperantistoj, ĉar ĝi prezentas kantojn ankaŭ en la lingvoj franca, itala, rusa, angla kaj bulgara. Eminenta donaco por amiko, ĝuinda kaj melodia aŭskultado por vi de la plej fama kaj riĉa baritona voĉo en Esperantujo. Subtila pruvo al la ĝenerala publiko pri la beleco de Esperanto. Mendu ĉe Emistudio por $11,00 kan., aŭ ĉe UEA por 30 gld.

BUKEDO DE LA MONATO. Ĉiumonate EMISTUDIO donas premion al bona esperantisto. Gesamideanoj bonvolu sendi al Emistudio nomon de inda esperantisto kun klarigo kial tiu indas ricevi kaj premion kaj "bukedon". Tiu kun la plej granda kvanto de proponintoj gajnos. La premio estas la varo supre reklamita.

ROZBUKEDON KAJ PREMION GAJNAS ĈI-MONATE
LORCÁN OhUIGINN EL KANADO

EMISTUDIO 765 Braemar Avenue, Sidney, BC V8L 3S1, Kanado.

Interesa kemio komprenebla por nefakuloj!
Ĵus aperis de Scienca Eldona Centro de UEA

MOLEKULOJ

de d-ro János Nyilasi (1922-1978),
profesoro pri ĝenerala kemio en Universitato de Budapeŝto "Eötvös Loránd".

Molekuloj traktas en populara maniero la fundamentajn problemojn de la ĝenerala, organika, neorganika, fizika, polimera kaj biologia kemioj. Ĝi prezentas la bazajn nociojn pri atomoj kaj molekuloj, konatigas la geometrion de molekuloj kaj ties konsekvencojn, aparte atentigas pri kemiaj ligoj en vivaj organismoj kaj donas superrigardon de la aktualaj metodoj de struktur-esplorado.

El la hungara tradukis Lajos Kovács. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1984. 118p., kun abundaj figuroj kaj tabeloj, 20cm. ISBN 963 571 145 X. Prezo: **nur 9,00 gld.** (plus sendokostoj).
Rabato de unu triono por samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj de Libroservo de UEA!

Kulmino de la roman-arto de Sudameriko

DOÑA BÁRBARA

de **Rómulo Gallegos** (1884-1969),
majstra priskribinto de la sudamerika pejzaĝo, en 1947 ŝtatestro de Venezuelo.

"La tradukinto atingis la plej altan rangon de nia arta prozo..." Juan Régulo Pérez

"Granda kvalito de la verko estas la perfekteco de la lingvo. ... rara juvelo, ..." Gaston Waringhien

"La traduko impresas mirinde klara kaj posedas la netan rigoron de la kabea stilo en *La faraono*." Henri Vatré

El la hispana trad. F. de Diego. Karakaso: Venezuela Esperanto-Asocio, 1975. 264p. 21cm. ISBN 84 399 2885 8. Prezo: **nur 16,20 gld.** (UEA estas la ĉefdistribuanto, do vi ricevos de la Libroservo de UEA **rabaton de unu triono** por mendo de minimume tri ekzempleroj) plus sendokostoj.

KSM
Koresponda Servo Mondskala de UEA
Petu la novan informilon de: KSM, p/a R. Llorens, 121bis, BD. Napoléon III, F-06200 Nice, Francio.

La longe atendita legolibro por progresantoj

- komisiita de UEA
- ideala por memlernantoj kaj gvidantoj de progresigaj kursoj
- de la fama verkistino

Marjorie Boulton

FAKTOJ kaj FANTAZIOJ

- ★ ekzercigas pri frazkonstruado
- ★ kreskigas skrib- kaj parolkapablon
- ★ pligrandigas la vortostokon de la leganto
- ★ uzas simplan stilon en 52 variaj ĉapitroj, plenaj de fabeloj, mirindaĵoj kaj rakontoj pri homaj atingoj kaj kuriozaĵoj el la tuta mondo.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

Eldonis Universala Esperanto-Asocio, 1984. 432p. Ilustrita de Alex Brychta. 21cm. ISBN 92 9017 028 X. Mendu ĉe la Libroservo de UEA. Prezo: 36,00 gld. (plus sendokostoj; rabato de unu triono por minimume tri ekzempleroj).